

7.40

**Teodoro Schwartz**

# **MODERNAJ ROBINZONOJ**

**EN LA SIBERIA PRAARBARO**



1914





Teodoro Schwartz

**MODERNAJ  
ROBINZONOJ**

– dua, redaktita eldono –

Eldonejo Bero  
PO Box 13492  
Berkeley CA 94712  
USONO/USA

*La jena teksto aperis felietone en Literatura Mondo (en 1923), post kiam ĝi estis premiita dum la IX-aj Floraj ludoj en Manresa), kaj libroforme kiel eldonaĵo de Literatura Mondo en 1924. Ni reaperigas ĝin kun la ekspresa permeso de George Soros, la filo de la aŭtoro, al kiu ni dankas.*

*Sur la kovrilo: Gefangenen (Kaptitoj), desegnaĵo de George Grosz (1915)*

La mapon havigis al ni Humphrey Tonkin.

© 1999, Humphrey Tonkin (por la Enkonduko)

ISBN 1-882251-24-5

## ENKONDUKO

„Nian ĉefredakoron, kies ĉefa principo de bona ĉefredakto estis: nenion publikigi en la gazeto de si mem, ni sukcesis konvinki pri tio, ke eble niaj legantoj jam estas scivolaj pri li kaj fine li, kun malespera gesto, transdonis al ni sian verkon premiitan dum la Internaciaj Floraj Ludoj en Manresa kaj rekomenditan de la Esperantista Literatura Asocio kun jenaj vortoj: Jen, havu, sed vi havas la respondecon! Ni esperas, ke niaj legantoj leginte la interesajn aventurojn de Dro Teo Schwartz, ne juĝos nin tro facilanimaj, ĉar ni ĝoje surprenis ĉi tiun respondecon.”

Per tiuj ĉi vortoj en sia numero de junio 1923 la gazeto *Literatura Mondo* komencis la felietonan aperigon de *Modernaj Robinzonoj*, mal-dika volumo de militaj rememoroj verkita en Esperanto de la juna Teodoro Schwartz (aŭ Ŝvarc), konata en postaj jaroj ekster la Esperantokomunumo kiel Tivadár Soros. La libreto aperis en entute sep partoj inter junio kaj decembro, kaj jam en la posta februaro la gazeto enhavis anoncon pri libroforma aperigo de la tuta teksto.

Teo Schwartz estis 28-jara kiam, baldaŭ post la reveno el milita kaptiteco en Siberio, li lanĉis, kune kun la juna medicinisto Kálmán Kalocsay kaj la aktoro Gyula Baghy, la revuon *Literatura Mondo* kaj samnoman eldonejon. Kvankam ne temis pri la unua literatura revuo en la lingvo (jam en la antaŭmilita periodo aperis kelkaj) *Literatura Mondo* tra la jaroj estis verŝajne la plej influa, kaj la tielnomata Budapeŝta Skolo de verkistoj kaj kritikistoj, kiun ĝi nutris, portis la Esperanto-literaturon al matureco dum la intermilitaj jaroj. Kalocsay mem rolis kiel mentoro al multaj aspiraj verkantoj, kaj li mem publikigis plurajn tre influajn kolektojn de poezio, originala kaj traduka, kaj abundajn kontribuojn al la stilistiko kaj lingvistiko de Esperanto. Baghy, same kiel Schwartz, estis lastatempa reveninto el Siberio: oni lin kaptis en septembro 1915 kaj li restis enkarcerigita en sinsekvo de kaptitejoj en Siberio kaj Manĉurio ĝis la reveno al Budapeŝto la 23-an de decembro 1920. Fekunda verkanto de poezio, teatraĵoj kaj fikcio, li aperigis du fikciajn prezentojn de sia siberia kaptiteco, *Viktimoj* (1925) kaj *Sur sanga tero* (1933). *Viktimoj* aperis felietone en *Literatura Mondo*.<sup>1</sup>

Laŭ kiu ajn mezuro, la teamo de Schwartz, Kalocsay kaj Baghy estis eksterordinara. Ĉiuj tri estis firmaj optimistoj, ĉiuj tri estis multtalen-

---

<sup>1</sup>Pri Baghy vidu Marjorie Boulton, *Poeto fajrokora*, Saarbrücken: Arthur E. Iltis, 1983. *Viktimoj* reaperis en dua eldono en 1991 (Budapeŝto: Eldonejo Fenikso), kaj *Sur sanga tero* en kvara eldono ankaŭ en 1991, ĉe la sama eldonejo.

taj, kaj ĉiuj tri posedis infektan entuziasmon pri ĉio, kion ili entreprenis. Por la 15-a Universala Kongreso de Esperanto en Nurembergo en 1923, ili formis trupon por prezenti kabaredon, kiun Edmond Privat, en sia historio de la periodo, nomis „vera regalo en bongusto kaj lingva brilo,”<sup>1</sup> kaj la aŭgusta numero de *Literatura Mondo* iom petole raportis pri la triumfo: „kvankam, pro diversaj kaŭzoj la materiala flanko de nia entrepreno ne povis esti tiel prospera, ke ni povus per ĝi iom plifortikigi la financon bazon de nia revuo—la morala sukceso estis konstatata de ĉiuj plej diversaj flankoj.” Apud la raporto, foto montras okpersonan trupon: Schwartz staras malantaŭ sidanta Baghy.

Teodoro Schwartz ŝajne estis malpli retirigema ol la redakcia mesaĝo al la legantoj de *Literatura Mondo* sugestis. La plej unua numero de la revuo, de oktobro 1922, enhavis mallongan hindan fabelon, *La plej justa juĝo*, rakontitan de Teo Melas, pseŭdonomo de Schwartz, kaj en la novembra numero aperis mallonga recenzo pri *La subiro de l'okcidento* de Oswald (ĉi tie erare nomata Oskar) Spengler kun subskribo „T.M.” La malantaŭa interna kovrilpaĝo de tiu ĉi numero portis anoncojn, el kiuj unu konsistis nur el la vortoj „Modernaj Robinzonoj” kaj amaso da demandosignoj. Tiu anonco daŭre aperadis en postaj numeroj kaj evidente estis la legantara tiklilo por la felietono—klara indiko, ke, jam de la komenco, oni intencis aperigi la verkon en la revuo. Se oni konsideras, ke la verko jam estis prezentita al la Floraj Ludoj en Manresa, ne povus temi pri verkisto kontraŭ la propra volo...

Tamen, *Modernaj Robinzonoj* estis la sola signifa literatura kontribuo de Schwartz al *Literatura Mondo* dum la du jaroj de lia proksima ligiteco al la revuo.<sup>2</sup> Dum Baghy kaj Kalocsay okupiĝis pri la enhavo, Schwartz ĉefe interesigis pri la komerca flanko: lia subvencio kiel eldonisto kaj proprietanto lanĉis la gazeton kaj tenis ĝin viva. Malgraŭ ĝiaj surpaperaj financaj perdoj, li saĝe vidis en la revuo bonan investon. Dum regis la hiperinflacio, la enfluo de eksterlanda valuto per kotizoj estis tre utila al li persone: li transformis ĝin en kapitalon, kiun li uzis por ekspluati la ekstreme favorajn investajn kondiĉojn tiam regantajn en Hungario.<sup>3</sup> En septembro 1924, kiam la Hungara Esperanto-

---

<sup>1</sup>*Historio de la lingvo Esperanto*, vol. 2 (Leipzig: Ferdinand Hirt und Sohn, 1927), pĝ. 185.

<sup>2</sup>La klapo de la libro de Schwartz *Maskerado ĉirkaŭ la morto* (1965) donas la impreson, ke aperis kelkaj kontribuoj sub la kaŝnomo Teo Melas. Mi trovis nur unu.

<sup>3</sup>„Li edziĝis al mia patrino kaj, parte el tiu geedziĝo kaj parte el profitoj, kiujn li gajnis per eldonado de Esperanto-gazeto, ni akiris kelkajn nemoveblaĵojn,” diras lia filo George Soros en *Soros on Soros* (New York: John Wiley & Sons,

Instituto transprenis la revuon, lia nomo malaperis de sur la kovrila paĝo. Redakcia mesaĝo en tiu numero, pardonpetante pro malfruiĝo de la apero, indikas, ke „ni devas aparte danki al la responda redaktoro dro. Teodoro Schwartz, kiu ebligis kaj helpis grandparte la ĝisnunan eldonon per konstanta subteno.” Lia nomo daŭre listiĝis inter la kunlaborantoj ĝis la fino de la jaro, kiam ĝi malaperis.

Kvankam Schwartz restis iom aktiva en la Esperanto-movado en postaj jaroj, la naskiĝo de liaj du filoj kaj aliaj respondecoj forprenis lian atenton de Esperanto. Dum la 1930-aj jaroj, laŭ la atestoj de la filoj, li vivis iom lozan sed evidente relative sukcesan vivon kiel advokato, kaj posedanto kaj administranto de domoj en diversaj Budapeŝtaj kvartaloj. La filoj memoras lin kiel homon kiu ĝuis la vivon, sportis, vojaĝis, vizitis teatron, kaj ĉiam ŝajne havis siajn utilajn kontaktojn. Li ne laboris pli ol li devis: li estis homo abunde inventema kaj elturniĝema. Tiu elturniĝemo kaj inventemo montriĝis ege necesa en la vivolukto de la Dua Mondmilito kaj formis eble la ĉefan heredaĵon al liaj du eksterordinare sukcesaj filoj Paul, inĝeniero kaj industriisto, kaj George, financisto kaj filantropo.

*Literatura Mondo*, kun financoj egale necertaj kiel tiuj de ĉiuj aliaj Esperanto-gazetoj, daŭris nur ĝis aprilo 1926, kiam ĝi abrupte ĉesis aperi. Ĝi estis revivigita en 1931 de Kalocsay, Baghy kaj aliaj, kaj pluvis ĝis 1938. Tria aperperiodo komenciĝis en 1947 kaj finiĝis en aŭgusto 1949, kiam la komunistoj firmigis sian regadon post la balotado en majo de tiu jaro, kaj ĉio ligita al Esperanto estis fermita aŭ transprenita. Ĉi-foje la malapero estis definitiva: Baghy mortis en 1967 kaj Kalocsay en 1976.

## II

La memuaro de Teodoro Schwartz pri Siberio, mallonga kaj verkita simplastile, estas esence aventura rakonto—rakonto pri junula inventemo kaj eltenemo, en stilo tia, kia la aŭtoro mem ŝatis legi en aliaj tiaj

---

1995), pĝ. 27. Se oni konsideras la malaltan abonnombron kaj la konstantajn redakciajn plendojn pri tiu malalteco, kiujn oni trovas en la revuo, oni tamen devas sin demandi ĉu la profitoj estis vere tiel pozitivaj. Pri la ekonomiaj kondiĉoj en Hungario tiutempe, vidu Paul Ignotus, *Hungary* (New York: Praeger, 1972): „faciligoj subtenataj de la registaro kun la celo ekspluati laboristojn, dungitojn kaj konsumantojn ... konsistigis esencan elementon de la kontraŭrevolucia hungara ekonomio,” kaj ili ebligis al investantoj rekordajn profitojn: „Laŭ enspezoj je investoj, la reĝimo Horthy estis paradizo de la kapitalistoj” (pĝ. 153).



rakontoj. La jaro estas 1920. La rakonto nin portas, ene de kelkaj paĝoj, el milita kaptiteco en la Rusa Malproksima Oriento laŭ vojaĝo tra militŝirita kaj necerta Rusio, dum kiu la aŭtoro serĉas vojon reiri al Eŭropo per ĉiu ajn rimedo. La vojaĝo komenciĝas per eskapo el kaptokazerno, kaj trajnveturo, kiu daŭras pli ol du semajnojn, portanta lin el Ĥabarovsk, norde de Vladivostoko, ĝis la plej sovaĝa regiono tra kiu pasas la Transiberia Fervojo, nome la montaroj norde de la Rivero Amur. De tie, nia aŭtoro piediras tra la montoj, fine atingante unu el la riveroj, kiuj fluas al Arkta Oceano. Li kaj la kunvojaĝantoj fine atingas la civilizon per iloj laŭ la danĝeroplana Rivero Vitim.

Schwartz tute eksplicite neas iun ajn literaturan pretendon: lia rakonto estas senornama kaj senpretenda. Ĝuste la simpleco estas inter ĝiaj meritoj, kiel atentigas anonco en la numero de *Literatura Mondo* de aŭgusto 1924: „Apartan valoron donas al la libro ĝia stilo: simpla, preskaŭ skiza, kiu tamen ... havas grandan espriman forton kaj sentigas ian karan simpatian facilanimecon.”

La titolo ligas la libron kun tradicio de imitoj de la angla verko *Robinson Crusoe* de Daniel Defoe (1660-1731). Tiu romano pri perdiĝo sur dezertinsulo kaj postaj aventuroj en diversaj mondopartoj montriĝis ege populara kaj estis tradukita en amaso da lingvoj. Jam en 1731 Johann Gottfried Schnabel, aŭtoro de la germanlingva imitaĵo de Defoe *Die Insel Felsenburg*, kreis la terminon *Robinsonade* por priskribi tiajn verkojn, da kiuj, inter tiam kaj nun, aperis centoj. Sed la robinzonado de Schwartz ne estas tre insista: aludoj al la stilo de Defoe aperas en la ĉapitrotitoloj sed apenaŭ aliloke.

La rakonto nenion diras pri la cirkonstancoj de la alveno de Schwartz en Siberion, nek la rolo, aŭ eĉ la armeo, en kiu li antaŭe servadis. Ĝi antaŭsupozas sciojn pri la politika fono, kiujn la hodiaŭa leganto plejparte ne plu posedas—kvankam iasence Schwartz ne interesiĝas pri tiuj fonaj cirkonstancoj ĉar temas pri rakonto koncerne la homan kapablon travivi, ne pri politika komentario. Efektive, li estis oficiro de la aŭstro-hungara armeo. En la verko *Maskerado ĉirkaŭ la morto* (pĝ. 14-15) li rakontas la cirkonstancojn de la enskribo:

Mi estis dudekjara junulo, kiam eksplodis la unua mondmilito. Mi rapidis al la fronto. Mi iris tien ne el patriota entuziasmo, sed pro timo, ke la mondmilito finiĝos tro baldaŭ. Mi estis certa, ke tio estas la lasta mondmilito; se mi tion preterlasas, en la estonta vivo mi ne havos okazon partopreni en tia unika evento.<sup>1</sup>

Do, li estis juna aventuranto, preta ĉion elprovi kaj optimista pri sia

---

<sup>1</sup>Teodoro S. Švarc, *Maskerado ĉirkaŭ la morto*, La Laguna: J. Régulo, 1965.

kapablo sukcesi. Kaptita unue de la (antaŭrevoluciaj) rusoj kaj ekspedita orienten, li pasigis la tempon en pluraj kaptitejoj ĝis li fine atingis Ĥabarovsk'on. Liaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis kiam en Julio 1918 Japanio, Britio, Francio kaj Usono (kune kun diversaj aliaj landoj, i.a. Latvio, Kanado kaj Serbio) kombiniĝis por sendi ekspedicion al Siberio, kies celoj estis iom obskuraj. Efektive, ĉiu partio havis sian propran celon, kaj tiuj celoj ne tre bone kongruiĝis: Britio kaj Francio volis en la komenco malfermi duan fronton kontraŭ la Centraj Potencoj (Germanio kaj ties aliancanoj), esence ignorante la Traktaton de Brest-Litovsk de 3 marto 1918, kiu, almenaŭ surpapere, pacigis Rusion kaj Germanion. Japanio ĉefe deziris altiri la Rusan Malproksiman Orienton kaj Siberion sub japanan politikan dominon. Se temas pri Usono, kvankam ĝi ja esprimis interesiĝon pri la dua fronto, precipe ĝi volis limigi la ekspansion de la japanoj.

Post la starigo de kontraŭbolŝevika registaro sub Admiralo Kolĉak en Omsko en oktobro-novembro 1918, la celo de la interveno ŝanĝiĝis. Nun la ĉefa intereso estis liveri subtenon al Kolĉak. La nova strategio esence izoligis aron da mezeŭropaj soldatoj en kaptitejoj en la Rusa Malproksima Oriento: ili havis nenian rilaton al la novaj celoj kaj valoris al neniu. Nun temis ne pri renverso de la germana imperiestro, por kiu ili batalis, sed subpremo de revolucio en Rusio. Fronte al la forta milita opono de Kolĉak, la Ruĝa Armeo retiriĝis okcidenten kaj ĝiaj subtenantoj en oriento (kiuj estis multaj: jaroj da Carista subpremo en Siberio havis sian efikon) esence dediĉis sin al gerila milito kontraŭ la apogantoj de Kolĉak, en kiu ili estis helpataj de la kruta kaj senhoma tereno de la regiono.

La militaj gajnoj de Kolĉak fine de 1918 kaj komence de 1919 plimalpli disipiĝis fronte al la Ruĝa obstino kaj diversaj strategiaj kaj taktikaj eraroj flanke de Kolĉak mem. La Admiralo, forlasante Omskon sub la avanco de la Ruĝa Armeo en novembro 1919, klopodis restarigi sian registaron en Irkutsko, sed perfidis lin al la Ruĝuloj la Ĉeĥo-Slovaka Brigado, aro da militkaptitoj kaj dizertintoj el la aŭstro-hungara armeo, kiu organizis sin en Kievo en 1916 kaj estis armita de la imperiaj rusaj fortoj por militi kontraŭ la germanoj kaj aŭstroj. Lia posteulo, Grigorij Semenov, ne estis multe pli ol loka militoĉefo, kies kozakaj sekvantoj, kun sidejo en Ĉita, teroris la lokajn enloĝantojn en la periodo post la falo de la Irkutska registaro.

Japanio, intertempe, estis apenaŭ sur fremda teritorio: ĝi nur dektri jarojn antaŭe militis ĉi tie kontraŭ Rusio en plejparte senrezulta milito. Ĉi-foje, kun fortoj multe pli grandaj ol tiuj de la aliaj aliancanoj, ĝi avancis ĝis Ĉita kaj Irkutsko, sed proponata puŝo pli okcidenten estis malobligita de la armistico fine de la jaro. Dum la armeoj de la aliaj potencoj retiriĝis relative rapide (la lastaj estis la usonanoj en aprilo 1920),

japanaj soldatoj restis sur la kontinento ĝis ili fine konsentis foriri en oktobro 1922 responde al usona diplomacia premo. Ili daŭrigis la okupon de Saĥaleno ĝis 1925.

Oni ne povas tro forte emfazi la marĝenan situacion de tiu aro da siberiaj aŭstro-hungaroj: ili rolis kiel peonoj en la manoj de kiu ajn, kiu deziris ekspluati ilin. Kiel hungaraj militkaptitoj, Schwartz kaj liaj kamaradoj reprezentis imperian aŭstran registaron, kiu ne plu ekzistis, kaj kiu en lastaj jaroj ĝuis malmultan subtenon en Hungario kaj ĉiuokaze falis sub kompletan influon de Germanio. Sub tiaj cirkonstancoj, la militkaptitoj apenaŭ povis kultivi en si signifan lojalecon al iu ajn, kaj estis malfacile eviti senton de kompleta kaj totala cinikismo. Multaj aŭstroj kaj hungaroj, en pli okcidentaj karceroj, regajnis sian liberecon per rekrutiĝo en la Blankan Armeon. Kvankam aliaj aliĝis al la Ruĝuloj, hungara nacieco ne en si mem indikis al la Ruĝuloj fidindecon, kaj hungaroj, kiuj falis en Ruĝajn manojn, ne povis atendi aparte kompatan pri-trakton. Aliflanke, tiuj homoj estis malvenkintoj en la Mondmilito kaj sekve ne povis antaŭvidi amikecon fare de la usonanoj, britoj aŭ japanoj. Kaj per la retiriĝo de tiuj aliancantoj, la kaptitoj estis lasitaj al la apenaŭ simpatiaj atentoj de la rusaj enloĝantoj, inter ili la sangosoifaj kaj senskrupulaj kontraŭbolŝevikaj kozakoj sub la loka reĝo de Ataman Kalmikov, kies sadismaj kruelecoj ofendis eĉ la proprajn sekvantojn. Se ni aldonas al ĉio ĉi la fakton, ke la Blankuloj estis aparte antisemitismaj kaj Schwartz estis judo, li troviĝis sur nenies amikolisto, kaj li tion bone konsciis.

Lia filo Paul memoras lian rakonton pri la Ruĝuloj, kiuj transprenis alian kaptitejon en la sama ĝenerala regiono kiel tiu en Ĥabarovsk, kie ili tuj mortigis ĉiujn gvidantojn inter la militkaptitoj. Teodoro estis unu el la „reprezentantoj de la kaptitoj” en la Ĥabarovska kazerno, do tia gvidanto: la okazintaĵoj en la apuda kaptitejo estis unu el la faktoroj, kiuj decidigis lin eskapi. La kozakoj verŝajne estus egale malsimpatiaj se ili unuaj alvenus.

Estas rimarkinde kiel malmulta tia politika kaj milita aludo trovas lokon en la rakonto de Schwartz: la teksto ŝajnas pendi en politika spaco. Eble en tio konsistis la laŭ *Literatura Mondo* „simpla, preskaŭ skiza” stilo de la verko. Lia celo, kompreneble, estis verki pri aventuro, kaj fokusiĝi je incidentoj kaj ne je historia fono. Verkante nur mallonge post sia reveno, eventuale li ankaŭ sentis, ke en revuo, kiu ekspediĝos al la tuta mondo, inkluzive la landojn de Meza Eŭropo kaj la nova Soveta Unio, necesas delikate treti por eviti ofendiĝon de la legantoj kun ties diversaj lojalecoj. Eble pro tio li ne daŭrigis la rakonton pli longe: la libreto finiĝas kiam la heroo estas ankoraŭ milojn da kilometroj for de la hejmo, en ĉirkaŭaĵo ne nur fizike sed ankaŭ politike malamika. Kvankam malmultas rekta kritiko de la nova ordo en Rusio, estas klare, ke

la bolŝevika mondkoncepto ne ŝajnis al Schwartz aparte simpatia—kvankam liaj internaciistaj kaj humanistaj principoj apenaŭ igis la alian flankon pli akceptebla.

En Siberio, ŝirmi sin kontraŭ la ĉirkaŭantaj homoj estis nur parto de la defio: Schwartz ankaŭ frontis eksterordinare malfacilan fizikan ĉirkaŭaĵon. Siberio estis plejparte ne evoluinta. La havenurbo de Vladivostoko estis fondita en 1860, sed nur en la fruaj 1900-aj jaroj oni ligis ĝin per fervojo al la cetero de Rusio—pere de Manĉurio kaj ties ĉefurbo Harbin. La fina versio de la Transsiberia Fervojo, kiu estis ekskluzive sur rusa teritorio kaj sekvis la nordan manĉurian bordon laŭ la Rivero Amur, malfermiĝis al trafiko nur en 1916. Ĝis tiam, estis du vojoj al Vladivostoko—la fervoja pere de Manĉurio, aŭ la perŝipa laŭ Amuro ĝis Ĥabarovsk, kie oni povis reentrajniĝi suden laŭ la linio Usuri ĝis Vladivostoko. La landinterno, la vera Siberio (la rusoj diferencigas inter la Malproksima Oriento, kie situas Ĥabarovsk kaj Vladivostoko, kaj Siberio mem) estis esence sen vojoj, kaj ĝia enloĝantaro limiĝis al diversaj nomadaj triboj kaj al malgrandaj minaj komunumoj laŭ la ĉefaj riveroj. Temis pri regiono de vastaj distancoj: miloj da kilometroj da malplena teritorio apartigis ĝiajn koloniajn vilaĝojn for de okcidento. Jam de la epoko de la imperiestro Petro la Granda, oni uzadis tiun teritorion kaj la orientajn regionojn kiel deponejojn por nedeziratoj—krimuloj, etnaj nedezirinduloj, politikaj malliberuloj. La militkaptitejoj daŭrigis tiun tradicion.

Ne estas facile trovi la precizan vojon, kiun Schwartz kaj liaj kamaradoj sekvis tra la montaro, sed la malmultaj indikoj, kiuj troviĝas en la teksto, en kombino kun detala studo de la mapoj de tiu regiono kaj la relative malmultaj eblaj traivojoj, donas pli-malpli klaran bildon. La grupo iris unue norden de la fervojo ĉe Ksenievka, ĝis loko nomata Itaka. De tie ili ŝajne grimpis laŭ valo, kiu kondukis nordokcidenten, kaj poste turniĝis okcidenten ĝis la fontaj akvoj de la Rivero Ilaĉa, kiu siavice fluas norden ĝis ĝi atingas la Riveron Olekma. Tie, en vasta, iom marĉa valo ili renkontis la nomadajn „araĉonojn” (anoj, laŭ moderna taksonomio, de la evenka popolo), kiuj poste estis tiel helpaj al ili. De tie, sub nomada gvido, ili pluiris norden kaj okcidenten, grimpante laŭ la Rivero Veneger kaj pasante sude de la samnoma monto. Adiaŭante sian gvidanton, ili plue daŭrigis okcidenten tra la lasta montara vico antaŭ la Rivero Vitim. Eĉ hodiaŭ, la teritorio, tra kiu ili iris, estas senhoma: kiam mi klopodis, kun la helpo de la bibliotekistoj de la Universitato Yale, pripaŭsi la vojon pere de detalaj modernaj mapoj, mi rimarkis, ke pluraj tiuj mapoj, kiuj tamen kovras grandan areon, havas entute nenian indikon pri konstanta enloĝado. Tiajn mapojn Schwartz kaj la kunvojaĝantoj kompreneble ne posedis; same mankis al ili multaj bazaj ekipaĵoj. Entute estis mirakle, ke ili ĉiuj sukcesis kompletigi la vojaĝon.

Precize kiel Schwartz finfine atingis Moskvon ni ne scias, nek multon scias liaj nun vivantaj familianoj. Alveninte Moskvon, li ŝajne havis iom aktivan kontakton kun esperantistoj, laŭ lia filo Paul. Kiam estis fondita en Petrograd en 1921 la „Sovetlanda Esperantista Unuiĝo,” ano de la Centra Komitato estis iu Ŝvarc, el Irkutsko, verŝajne Teodoro. Laŭ la historiisto Ulrich Lins (en persona komuniko al mi), „ne estas klare, ĉu li persone ĉeestis la fondiĝan kongreson. Sed post ĝi li subskribis deklaron pri la fondiĝo de SEU direktitan al la tutmonda esperantistaro, subskribitan de li kiel sekretario kaj de [Ernest] Drezen kiel prezidanto.” Sed Teodoro, organizemulo kiel ĉiam, tamen ankoraŭ ne estis libera reiri al Hungario—kiel li klarigas en *Maskerado* (pĝ. 46):

Alian sukcesan rolludon mi prezentis, kiam mi estis 27-jara viro. En la jaro 1919 la komunista reĝimo de Béla Kun falis post kvarmonata regado. La ruĝan reĝimon sekvis la blanka teroro de Horthy. Tiutempe mi vivis en rusa militkaptiteco. La rusoj ne permesis la hejmeniron de hungaraj militkaptitaj oficiroj. La rusa registaro retenis ilin, kiel garantiulojn, ĉar tiamaniere ili volis malhelpi la blankajn teroragojn de la Horthy-reĝimo. Intertempe la aŭstroj estis hejmensendataj ĉiusemajne en grupoj po kvincent personoj. Mi vidis envie kaj malgaje la hejmenirantajn aŭstrojn. Post sep jaroj da milito kaj kaptiteco mi ege deziris hejmeniri. Okaze mi trovis ie gvidlibron pri Linz, granda urbo de Aŭstrujo. La libro estis plena de bildoj kaj desegnaĵoj. Mi trastudis la libron kaj prezentis min antaŭ la repatriiga komisiono kiel aŭstro, naskiĝinta en Linz. Mi ĝuste respondis la demandojn de la komisiono kaj sen malhelpo mi ricevis la envicigon en la sekvontan transporton, kiu devis ekiri je la 14-a de aŭgusto de la jaro 1921.

Tia inventemo kaj tia instinkto al travivo karakterizis la personecon de Teodoro Schwartz tra la tuta vivo. Li ekspluatis tiujn kvalitojn denove en Budapeŝto dum la Dua Mondmilito, kie la juda travivo dependis de la kapablo superruzi la instancojn kaj eluzi la tutan inventemon je sia dispono.

### III

Teodoro Schwartz travivis ne nur la Unuan Mondmiliton sed ankaŭ la Duan. Kiam la Nazioj okupis Hungarion, li lasence floris sub la danĝero, kaj la vivminacoj kreskigis en li ĉiun lian elturniĝemon kaj krimon. „Tiu estis la plej brila horo de mia patro,” diras la filo George, „ĉar li sciis kiel agi...”

Li komprenis la situacion; li komprenis, ke la normalaj reguloj ne validas. Obei la leĝojn fariĝis danĝera manio: ignori ilin es-

tis la sola maniero travivi. Spertinte la Rusan Revolucion, li sciis kion fari... Tiu estis periodo de ekscitaj aventuroj... Mi estis 14-jara. Mi havis patron, kiun mi amegis, kiu regis la situacion, kiu sciis kion fari, kaj kiu helpis aliajn personojn... La sperto havis decide forman efikon je mia vivo, ĉar ĉe granda majstro mi lernis la arton travivi.<sup>1</sup>

La historio de la travivo de Teodoro, la edzino kaj la du filoj estis poste rakontita en la libro *Maskerado ĉirkaŭ la morto*, kiun Teodoro aperigis ĉe la eldonejo Stafeto en 1965. La eldonanto Juan Régulo Pérez, alia travivanto, kiu suferis kiel batalanto dum la hispana civila milito, verkis la antaŭparolon. *Maskerado* estas ne nur signifa verko en la historio de Esperanto, sed ankaŭ grava en la historio de judaj travivaj rakontoj. Malmultaj tiaj rakontoj, nun abundaj, estis verkitaĵoj en la unuaj dudek jaroj post la milito: tiu de Schwartz estis inter la unuaj. Feliĉe, ankaŭ ĝi baldaŭ aperos en nova eldono, tiel kompletigante la reregistron de la verkaj atingoj de nia aŭtoro.

La fino de la milito ne elĉerpis la inventemon de la patro. Kiam en 1947 okazis la unua postmilita Universala Kongreso en Berno, Teodoro sukcesis aranĝi, ke li kaj la filo George troviĝu inter la oficiala hungara delegacio (la nomo de la pli aĝa filo Paul aperis en la kongresa libro, sed li efektive ne ĉeestis). Post la kongreso, George restis en Svislando ĝis li povis akiri britan vizon. En Londono li kontaktis la lokajn esperantistojn, kiuj faciligis al li la transiron almenaŭ per liverado de subtena amikeco. En Londono George ekstudis, finante siajn studojn ĉe la monde konata *London School of Economics* de la Londona Universitato. Lia frato Paul sukcesis eliri la landon kiel ano de la hungara olimpika skiteamo, restis en Aŭstrio, kaj tie akiris usonan studentan vizon. En Usono, li diplomigis kiel inĝeniero. Teodoro mem, kun la edzino Erzsébet, elfuĝis Hungarion en 1956 kaj ekloĝis en Novjorko. Teodoro restis aktiva membro de la Novjorka Esperanto-Societo kaj partoprenis Universalajn Kongresojn en Tokio en 1965 kaj Budapeŝto en 1966. Li mortis en Novjorko en 1968.

Humphrey Tonkin

---

<sup>1</sup>*Soros on Soros*, pĝ. 28-29.



Antaŭ multaj jaroj, en mia infanaĝo okazis, ke mia kara panjo dolĉe demandis min, tiel dolĉe, kiel povas demandi nur amanta patrino:

– Fileto! Kio vi volas fariĝi, kiam vi plenkreskos?

Mi respondis kun la fiereco de 7-8-jara knabo:

– Esploristo aŭ malkovranto.

Mia panjo—mi bone rememoras—glatigante per siaj delikataj manoj mian dubenigran hararon, bonkore ridante rigardis min.

„Ho! Vi eta naivulo, kiam vi plenkreskos, jam ĉio estos esplorita, malkovrita!”

Mia infana koreto kunpremiĝis kaj mi estus preferinta tuj fariĝi plenaĝulo, por ke neniu povu anticipi miajn planojn. Kun sincera envio mi pensis pri Robinzono, Stanley, Kolumbus kaj pri aliaj, kiuj havis la feliĉon naskiĝi kaj vivi antaŭ mi.

De tiam jaroj, longaj kaj suferplenaj, pasis for, sed komencante la priskribon de mia aventura vojaĝo tra la siberia praarbaro, mi ne povas ne rememori pri tiu ĉi momento de mia infana revo.

Bedaŭrinde, la revo realiĝis, ĉar la sorto, ĉi tiu kaprica forto, ĵetis min en malproksiman orienton kaj devigis min vagadi, erarmigri milojn da verstoj en la siberia praarbaro, en la mistera, danĝera tajgo.

Koncize priskribante la okazintaĵon, mi ne intencas doni eternvaloran verkon, ĉar ne posedante la potencon majstran de la plumo, mi restos nur fidela interpretanto de travivaĵoj kaj sentoj miaj.

Tiu ĉi verko celas esti sole rememoraĵo pri homaj sufero kaj doloro, travivintaj en la XX-a jarcento, nomata „epoko de la humanismo”.

Legu kaj neniam sopiru fariĝi... Robinzono!





## 1-a ĈAPITRO

(en kiu estos informata la kara leganto pri plezuroj de militkaptitoj,  
pri la humaneco de la partioj batalantaj kaj pri io, kio ebligas la  
daŭrigon de tiu ĉi historio)

### En la kaptiteco

Kie la manĉuria<sup>1</sup> limo tuŝas la orient-siberian, ĉe la renkontiĝo de du grandegaj riveroj Usuri kaj Amur estas la urbo Habarovsk. En la proksima najbareco de tiu ĉi ŝaŭme vivanta urbo oni konstruis la malgajan tombejon de vivantaj homoj. Ĝi estis la militkaptitejo. Malgraciaj, dikmuraj kazernoj, kiuj kunpreme katenis la vivon de pli ol du mil militkaptitoj. La ruĝkoloraj brikoj de la muroj, kvazaŭ respegulante la sangsoifon de l' konstruintoj, rigide rigardis la najlodratajn barilojn, post kiuj mizere vivaĉis germanoj, turkoj, hungaroj, kiujn devigis militi la XX-a jarcento. Vivante en tiuj ĉi kazernaj kriptoj tri-kvar jarojn, kelkaj eĉ kvin-ses jarojn, plendante pri forrabita printempo de sia vivo, ili fariĝis maljunuloj, neniom ĝuintaj el la plezuroj de la tera edeno.

Tiutempe Siberio estis scenejo de gravaj politikaj metamorfozoj. En la jaro 1918 la Entento decidis armile enmiksiĝi por paciĝi (je propra profito) la diversajn politikajn partiojn. En Vladivostok, 500 verstojn de Habarovsk, ĉiutage oni elŝipigis armeojn de diverskoloraj kaj diversnaciaj soldataroj. Francoj, angloj, kanadanoj, amerikanoj<sup>2</sup>, italoj, ĥinoj kaj japanoj renkontis sin por defendi la altajn idealojn de l' humanismo.

Nia militkaptitejo troviĝis en la interesosfero de l' amerikanoj kaj japanoj kaj ili alterne militkaptis nin „militkaptitojn” por triumfe raporti pri la granda akiraĵo.

Tiamaniere ankaŭ mi havis la honoron trifoje militkaptiĝi. Unue la rusoj, poste la amerikanoj kaj fine la japanoj sen invito gastigis min kun vere kortuŝa gastameco. Tiu ĉi fakto laŭŝajne sensignifa kunhavis grandan financan aliformiĝon. Tagon post tago la rublo senvaloriĝis kaj ni kiel oficiroj ricevis nun 25 dola-

---

<sup>1</sup>*Manĝuria* en la originalo

<sup>2</sup>komprenu „usonanoj”

rojn, respektive 50 jenojn, anstataŭ 50 rublojn. Unuvorte: kvincentfoje pli ol antaŭe. Pro tio multmiloj da kaptitoj vivantaj en Siberio deziris ke ankaŭ ili estu kaptitaj de l' amerika armeo. Notinde estas, ke al la deputitaro peteganta, kiu priskribis per sincera, korpemiga parolo la situacion mizeran de la Petropavlovskaj militkaptitoj, el kiuj mortis pli ol 2 000 homoj pro malsattifo dum du monatoj, la estro de la amerika ruĝa kruco respondis jene: „Ameriko havas nur larmojn por mildigi la suferojn, sed ne la monon!” kaj li donace disdonis kelkajn preĝlibrojn kaj rozariojn.

Verdire nia financa stato pliboniĝis kaj ni estis nomataj „milionuloj de l' militkaptiteco”. Sed ni vere estis nur „milionuloj de l' mizero” kaj neniu estus enviinta nin, havante la saman situacion. La plimulto de miaj samsortanoj, ne ricevante iun ajn sciigon pri siaj hejmo kaj familio, melankolie rigardis al la nigra estonteco. La ĉiama malcerteco, la konstanta senvirina socia vivo, la troloĝateco de la ĉambroj (60-70 personoj loĝis kune), la venena odoro de haladzo kaj la bacilhavaj enspirajoj ne nur rompis la sanecon de l' nervaroj, sed ruinigis ankaŭ la animan ekvilibron; la imagforto de ekscititaj mensoj—frenezon. Ĉiutage plimultiĝis la nombro de tiuj, kies anima stato ne povis porti plu la ŝarĝon de la „milionula vivo”, akompanatan de konstanta skrupulo.

Ho, kiel ni envidatoj sopiris la vivon de niaj envidantoj, kiuj kvankam mizere trenis la ĉaron de l' vivo, tamen havante la eblecon de la libera movo, povis forgesi momente siajn turmentojn. Kion fari? Kion fari? estis la senĉesa plendkrio, kiu ricevis respondon neniam.

Amerika regimentestro Morov promesis baldaŭan reenpatriiĝon, sed la promeso restis promeso. Lia Moŝto Janin, franca generalo, sendis manskribitan leteron, promesante sian helpon, kvankam la ŝipoj ankoraŭ ne vidiĝis sur la blua horizonto de l' maro, eĉ ne estis je lia dispono. Sed konsoli estas bela virto kaj kostas neniom. Li promesis eĉ tujan helpon, se ni estos pretaj kun pafilo en la mano ekmarŝi laŭ la okcidenta direkto tra la Uralmontaro kaj rompi la fronton de bolŝevistoj<sup>1</sup>, kiuj laŭdire minace

---

<sup>1</sup>*bolŝeviko* en la originalo

proksimiĝis. (En tiu tempo Kolĉak, rusa generalo, retiriĝis kun sia armeo el Omsk.) Oni ĉiumomente traktis novan promeson kaj ni ĉiumomente pliriĉiĝis je nova trompiĝo. La ĉion neanta pesimismo iom post iom disetendis siajnflugilojn, kies ombroj funebre malheligis eĉ la plej etan fajron de l' espero. La lipoj kurbe silentis,—nur kelkfoje eliĝis la kutima plendfrazo. „Ne eble rezisti plu!”—„Mi ne ricevis leteron de 5 jaroj.”—„Filineto mia certe ne rekonos min!”

Mi estis 18-jara, kiam estis devigita komenci la soldatan vivon kaj nun 24 jarojn mi povas kalkuli por mi. Kiu redonos mian junecon perditan? Kion fari? Kien iri?

Kion? Ien ajn, nur rifuĝi for el tiu ĉi muelejo, kie oni frakosas homajn animojn. Rifuĝi kaj flugi al la libera aero, al malproksima lando, kie atendas nin ama ĉirkaŭpreno de niaj gepatroj, fianĉino... Kaj jen naskiĝis la penso pri forkuro...

Oriente, al Vladivostok, la kontrolo estis tre severa kaj pli ol unufoje okazis, ke oni reportis forkurinton el... Kanado<sup>1</sup>. Okcidente, al la batalfronto de generalo Kolĉak, kvankam atendas milo da danĝeroj, sed bonŝance eble...

— Dum printempo!—ni konsole kaj kuraĝige ripetis senĉese ĉi tiun frazon. En Siberio la vintro daŭras de oktobro ĝis junio kaj se oni multe hezitas aŭ ne profitas la pli favorajn sezonojn, jam estas vana ĉio... ĉio. Forkuri! Jen la sola savo por ni!

Kiel epidemio disvastiĝis la lernado de la rusa lingvo kaj ĉiu komencis studi iun metion. Ankaŭ mi konvinkiĝis, ke la doktora diplomo valoras malmulte, se fremdlande oni devas perlabori la ĉiutagan panon kaj pro tio, en la jaro 1919 mi fariĝis diligenta metilernanto de maŝinseruristo, opiniante, ke pere de tiu metio mi povos prosperi dum la longdaŭra vojaĝo. Ĉiutage sintrude mi iris por labori, ĉar la nekutima okupo kaŭzis trolacigon. Tamen ĉi tiu lacigo estis la plej feliĉa profito, kiun mi havis post la 7-8-hora labortempo, ĉar ĝi lulis min al dormo sensonga.

Subite aliiĝis la politikaj cirkonstancoj, kiuj havis grandan influon je la vivo, ŝajne trankvila kaj indiferenta, de la militkaptit-

---

<sup>1</sup>Kanada en la originalo

ejo. Evidentiĝis la falseco de tiu percepto, ke „mi ne interesiĝas pri politiko!” „Nenian rilaton mi havas kun ĝi!” k.t.p., ĉar la politikaj okazintaĵoj de la ekstera mondo renversis ĉion ankaŭ en la interno de niaj kriptoj post la najlodrataj bariloj. Iom da espero ekĝermis en niaj animoj.

La milita aventuro de l' grandaj potencoj en Siberio senrezulte mortaĉadis kaj vekis malsimpation, krom tio la registaro de generalo Kolĉak konstatinte la plenan fiaskon de siaj projektoj decidis retiri sin kaj cedi la lokon por nova reĝimo. Unue forlasis Siberion la taĉmento de italoj, francoj, ĥinoj kaj angloj. Kontraŭ la postlasita amerika soldataro la rusaj gazetoj, subaĉetitaj per japana mono, propagandis, ironie menciante, ke „Ameriko verŝajne pensas tion, ke Siberio estas akvujo, el kiu povas trinki ĉiu bovo”. Finfine eĉ Ameriko prudentiĝis kaj reordonis siajn taĉmentojn.

En Siberio restis sola la japana armeo kaj per mejlaj paŝoj proksimiĝis la ruĝa armeo. La 10-an de februaro 1920 ĝi atingis kaj okupis Irkutsk-on, la ŝlosilon de Mongolio. Ni, inertaj malferliĉuloj, atendis kun kortremeto la renkontiĝon de tiuj ĉi du gravaj kolosoj. Ne pro la sorto de Siberio, nek pro la milita bonŝanco de iu ajn armeo el la du malamikoj, sed pro nia propra vivestonto regis nin la malpacienco, miksita kun komprenebla timo.

Klaĉaj babilajoj, bataalkampaj raportoj, kiujn la tro ekscititaj pesimistoj kaj optimistoj mem disvastigis inter ni, kvazaŭ kinematografe montris la grandan teatraĵon, de kiu dependis ankaŭ nia sorto. Fine ĉiam pli kaj pli firmiĝis la famo, ke en soveta<sup>1</sup> Ruslando ne ekzistas plu militkaptitoj, ĉar la tiea registaro repatrujigis ilin jam antaŭ longe... Ho kiom da larmoj, suferoj kaŭzis tiu ĉi falsa informo! Kiom da homaj vivoj estis estingitaj poste pro tiu ĉi bonintence farita konsolo...! Sed ni kredis la verecon de tiu kaj... decidis.

Sufiĉas! La packontrakto estas subskribita de pli ol du jaroj kaj ni atendas ĉe la limo de Ĥinio sen espero. La registaroj faras nenion por helpi nin, do estas urĝe agi kaj ĉesigi ĉi tiun malbenitan staton per propra helpo.

---

<sup>1</sup>sovjeta en la originalo

---

Kaŝe ekbrilis la okuloj de kelkaj samsortanoj kaj ĉiutage kreskis la nombro de tiuj, kiuj flustre demandis unu al alia: „Ĉu ankaŭ vi?”. Oni facile komprenis, ke pri baldaŭa forkuro aludas la parolanto. La respondo estis simpla, kiel la demando, sed akompanata de dolĉespera rideto: „Ankaŭ mi!”

Neatendite la japana komandantaro decidis forlasi la okcidentan parton de Habarovsk, gubernion Amur kaj la plenpotenca generalo adiaŭdirante deziris feliĉon al la multon suferinta rusa popolo. Fine! Jen estas la tempo por agi!

Ekstere grincis la 40-grada frosto sed interne en la kriptoj ni atendis kun senpacienca espero... la reviviĝon. Super la helblua neĝtavolo, kvazaŭ odoro de malproksimaj violoj, ŝvebis logante nin... la libereco!

## II-a ĈAPITRO

(en kiu la leganto ekscias, ke la decido ne estas sufiĉa por la forkuro)

### La forkuro

Kiel pluvo post longa seko, tiel bone efikis por la senkuraĝaj, preskaŭ senenergiaj kaptitoj la decido pri forkuro. Forkuro signifis memstarecon kaj viran volforton.

La forkuro nur en la unuaj tagoj de marto povis okazi, ĉar, kiom ajn ili sopiris je libereco kaj freŝa aero, la februaran salajron oficiran (50 jenoj, hodiaŭ 2 000 000 aŭstraj kronoj) neniu estis volinta lasi en la ŝtatkaso de Japanio.

– Kiu scias, por kia celo estas utile, se almenaŭ iom da mono estas en la poŝo?—pensis ĉiu forkuronto.

La unuan de marto jam estis rimarkeblaj tra la fenestro de l' tendaro, sur la neĝmantelo de la rivero Amur kelkaj nigraj punktoj: la unuaj forkurintoj. Cetere la forkuro mem ne estis farita per sagacaj artifaĵoj de „Monte-Cristo”, kaj oni nur la plej necesajn objektojn intencis kunpreni.

La trian de marto 1920 matene ĉion, kion mi opiniis oportuna aŭ uzebla, mi kolektis en tornistran, kaj mian malgrandan kapitalon (110 jenojn) metinte en monsaketon sub la ĉemizo, kaj notinte la adresojn de kelkaj kamaradoj por sciigi iliajn parencojn post mia alveno, mi komencis la plenumadon de l' decido.

– Sed skribu! Post kelkaj tagoj... ankaŭ mi sekvos vin!—akompanis min la ĥoro de l' amikaro, kaj mi, kune kun du kamaradoj, per helpo de falsigita portendara pasporto, forlasis la tendaron malbenitan. Kompreneble estis kelkaj, kiuj pli romantike aranĝis la forkuron. Ili ŝtele elrampis sub la dratbarilo aŭ sin kaŝis en la balaaĵveturilo forportota.

Ekster la barilo tamen ni ne estis en tuta sendanĝereco. Japanaj patroloj postenis kaj cirkulis ĉiudirekten. Nia falsa pasporto valoris nur en unuversta distanco ĉirkaŭ la tendaro, kaj, tiukaŭze, ni klopodis eviti gastaman renkontiĝon kun japanaj patroloj.

Kelkajn kilometrojn larĝa rivero disigis nin de la urbo, kiun multfoje ni rigardis kun envia sopiro tra la fenestroj de niaj kazernoj.

Nur alveninte al la bordo de l' rivero, ni spiris pli libere, sed samtempe rimarkis, ke akra ventego furiozas ĵetante neĝkristalojn al okuloj, oreloj kaj nuko, kaj enkovris la vojon per senpostsigna

tavolo blanka.

Kontraŭ la venta direkto ni devis iri. La glacia malvarmo, penetranta ĝis la ostoj, pli ol unufoje haltigis nin por froti per manoj la neĝkovritajn partojn de la kapo, kaj tiamaniere zorgi pri ilia sano. Tamen kun tiom granda forto ni antaŭenpaŝis en la neĝtavolo, alta ĝis talioj, ke la ĉemizo malsekiĝis de ŝvitado. La piedoj kvazaŭ maŝine funkciis kaj niaj movoj iom post iom montris nur lacigon. En la mezo de la rivero ni ripozis. Kiel dolĉe estis entombiĝi en neĝo kaj profunde enspiri la akran aeron tra la malfermitaj lipoj! Tion povas kompreni nur tiu, kiu mem faris militan aŭ devigan marŝadon. Sed malgraŭ ĉiu fortostreĉado, la vojon, kiun en ordinaraj cirkonstancoj oni povas trairi dum du horoj, ni faris en la ventoblovo dum ses horoj.

Kiam ni estis alvenintaj en Habarovsk, jam troviĝis tie 250-300 militkaptitoj. Per tiuj ĉi forkurintoj estis plenigita ĉiu kafejo, sukeraĵejo, bulvarado. La rusoj estis vere tre ĝentilaj. Ili nomis nin „civitano”, kaj niajn pli aŭ malpli entuziasmajn admirojn antaŭ beleta knabino aŭ montra fenestro ili akompanis kun bonkora rideto. Memkompreneble, la humoro estis tre vigla, eĉ bona, kvazaŭ ni estus rejuniĝintaj. Ĉio ŝajnis esti en bona ordo rilate nian aferon. Ĝis nun inter la almlilitantaj japanoj kaj la loĝantaro estis partizana (neregula) milito, kaj pro tio ĉiumomente estis ie difektita la fervojlinio. Post la japana pacdeklaracio la partizanoj revenis el arbaroj kaj laborante kune kun la japanoj rekonstruis, respektive riparis la relparojn por faciligi la baldaŭan evakuadon de la japana armeo.

— Ĉu vi aŭdis, oni diras, ke morgaŭ iros la unua vagonaro en Ruslandon?—diris mia inĝenier-amiko, kiun mi renkontis sur la Bolŝaja ulica<sup>1</sup>.

— Nu! Ni alkroĉiĝos! Se alimaniere neeble, ni algluiĝos al la radoj!—mi respondis kun ridetanta memkonfido.



Jam frumatene ni staris en la vico, atendente antaŭ la biletkaŝo, kaj post longdaŭra interpretado fine sukcesis akiri biletojn, kvankam ni estis decidintaj provi la forvojaĝon eĉ sen ili. La vagonaro, konsistanta el 40 brutvagonoj, enhavis proksimume 2 000 invalidojn, malsanulojn. La militkaptitoj apartenis al la malsanuloj. Mi enpremis min mezen de 50 vojaĝantoj. La haringoj en barelo ne estas tiom kunpremitaj, kiom estis ni, kaj tamen ni ĝojis pro tiu tumulto, ĉar la natura varmo de la korpoj anstataŭis la hejton.

Neniu estis informita pri la lasta stacio de nia vagonaro. Kelkaj asertis, ke ni seninterrompe veturos ĝis Moskvo, aliaj dubis kaj antaŭdiris nur kelkcent mejlojn. Ĝenerale 7-8 000 verstoĵoj estis la diferenco inter la opinioj. Kelkajn horojn ni atendis senpacience, dentklake pro malvarmo, je ekiro de la vagonaro. Ni atendis... atendis, sed la vagonaro obstine restis senmova. Subite, antaŭ la vagonaro aperis kapitano kiu, ekscitite, ruĝiĝinte pro la dirota sensacio, kriadis:

— Ĉu vi aŭdis? La japanoj mortpafis hodiaŭ tri militkaptitojn. Ili volis forkuri ĉe la angulo de hospitalo. Ilin rimarkis la postenstarantoj kaj, je la ordono de kapitano Uheda, ili mortigis ilin.

— Terure! Bruteco!—kriis la militkaptitoj el la vagonoj.

— Kiujn ili mortpafis?

— Piros, Gerber, la nomon de la tria mi ne rememoras!

La tragedia fino de la tri junaj homoj, kiuj mortis antaŭ ol vivi iom, tre konsternis nin, sed pro niaj rigidiĝintaj kaj malviglaj sentoj ni baldaŭ forgesis ĉion, eble pensante, ke dank' al la sorto ne nin trafis tiu malfeliĉo.

Fine! La vagonaro ekmoviĝis kaj la optimismaj matematikistoj jam kalkulis la ĉiutagan mezan rapidecon, kiu estis necesa por atingi dum tri semajnoj Eŭropon. Nur tio estis ĉagrena, ke neniu el la fervoja oficistaro povis certigi nin pri la lasta stacio.

Tre malrapide, kvazaŭ rampante trenis nin la lokomotivo. Ses tagojn daŭris la vojaĝo ĝis Blagoveŝĉensk kaj ĉi tie unu el la oficistoj, kun kiu mi parolis pri nia malhela sorto, kvazaŭ petegante persvadis min:

— Ne iru plue! Restu ĉi tie! En la urbo vi ricevos laboron. La malkareco ebligas modestan vivon. Pli malproksime nenion oni

produktas kaj la tuta ĉirkaŭaĵo estas malsatanta teritorio, ĉar la japanoj ne forlasis la Zabajkalan regionon. Volante nur vian bonon mi konsilas, ke vi restu ĉi tie ĝis la situacio estos pli favora!

Kelkajn el ni la bonintenca averto influis, sed la plimulto decidis daŭrigi la vojaĝon.

Ankoraŭ dek tagojn ni estis skuataj per malrapida antaŭenpuŝado kaj la farita vojo apenaŭ atingis 800 verstojn, ĉar la pontoj estis detruitaj kaj oni konstruis provizorajn el traboj kaj subrelaj lignostangoj.

Gazetojn dum la tuta tempo ni ne povis ricevi, kvankam en tiu tempo kiu ajn sciigo estus povinta tre grave influu niajn decidojn.

Foje, nokte, haltis la vagonaro kaj oni tuj sciigis nin, ke ĝi ne povas plu daŭrigi sian vojon, ĉar baras la vojon milita fronto.

Malĝojigite kaj malbenante la tutan aventuron ni promenis inter la relparoj. Kion fari? Reiri aŭ antaŭen!? Neeble, ke fronto ekzistas, ĉar tio kontraŭdirus la pacdeklaracion de la japanoj.

Dum la sencela marŝado tien kaj reen mi rimarkis, ke oni du vagonojn alkroĉas al la lokomotivo. Tuj irante tien por informigi min, mi demandis per neperfekta lingvo:

— *Kuda? Kien?*

— Al Kseniovskaĵa!—estis la respondo.

— Tie estas la partizana komandantaro kaj oni venigas nin por labori!—klarigis iu el la rusoj.

— Ĉu ne estus eble, ke vi kunportu min?

— Civitanoj ne povas vojaĝi kun fervojlaboristoj! Ĉu vi estas laboristo?

Forlasinte ilin mi pritraktis la aferon kun miaj samsortanoj kaj anoncis sin tuj dekunu el ili, kiuj estis emaj alpreni la taskojn de fervojlaboristoj. Dum la sama nokto ni forlasis la ceterajn.

Kseniovskaĵa. Lasta stacio. Malgranda vilaĝo, kie oni povas nenion ricevi de la naturo, krom oron. Kiam foje mi demandis iun, aludante pri la du batalantaj partioj: „Kia estas la loĝantaro, ruĝa aŭ blanka?”—la respondo estis: „Flava!”—Ili amas nur la oron.

Ni komencis la laboron. La ŝarĝon de la ĉiutagaj zorgoj plimalpezigis la espero, ke ni baldaŭ estos povantaj daŭrigi la vojaĝon. Sed estis vane, ĉar el tagoj fariĝis semajnoj, eĉ monatoj.

Ĉiam pli kaj pli da militkaptitoj venis al nia ĉirkaŭaĵo. Multfoje ni priparolis nian sorton kaj, por plibonigi ĝin, estis plektitaj fantaziaj planoj, sed vane. Nur pri unu punkto ni estis konsciaj, ke post la forpaso de monatoj junio kaj julio atendas nin la terura Siberia vintro, kiun ni jam bone konis kaj timis.

Tri monatoj pasis for de la tago kiam ni forlasis la militkaptitejojn, kaj la sola rezultato de nia aventura decido estis: ke ie, kie la 25-an de majo neĝas kaj metrojn alta blanka tavolo kovras ĉion, ni povis manĝi salitajn fiŝojn post la animojn kaj korpojn muelanta laboro.

Oni devis fine decidi ion. Pro tio je la 29-a de majo estis kunvokitaj la militkaptitoj el apudaj stacioj por pritrakti definitive la estontajn agadojn.

### III-a ĈAPITRO

(en kiu la leganto estas sciigata, ke ne estas simpla afero la veturado tra la praarbaro)

#### La pritraktadoj

La 29-a tago de majo estis sekve la decida tago. La naturo mem, kvazaŭ sin preparante por novaj aventuroj, prenis sur sin novan kostumon. Ĉio fariĝis verda, pompe verda. En Siberio la transiro de vintro en someron okazas subite, kaj la arboj, kvazaŭ antaŭsentante la mallongan sezonon de l' plezuroj, rapidas por vivi, simile al tiuj homoj, por kiuj estas destinita nur mallongdaŭra vivo kaj kiuj, uzante ĉiun momenton, konsumas sin per efemeraj ĝuoj. La arboj burĝonas, plenverdiĝas dum semajno. Nenio pruvis pli elokvente la vivkapablon de la ĉi tieaj arboj ol la detranĉitaj, senfoliigitaj vergoj, kiuj kelkfoje reburĝonis.

Verŝane la kelkajn tagojn daŭranta printempo estis jam bonefika por la humoro de l' militkaptitoj, ĉar, amasiĝante anstataŭ la barakoj, ili estis pli viglaj ol kutime. Dum la kunveno, kiel ĉiam, la opinioj dividiĝis. Unuj konsideris plej prudenta la reiron al Blagoveŝĉensk, aliaj entuziasme defendis la daŭrigon de l' vojaĝo al okcidento.

Rumana anarĥiisto konsilis, ke ni tramigrigu la praarbaron. Sian rakonton li efike argumentis per la rakonto pri araĉonoj, gento naskita kaj vivanta en la praarbaro, kiu konante ĝin kiel sian manplaton, povas servi je niaj helpo kaj gvidado.

Aŭstriano, elpoŝigante landkarton<sup>1</sup>, parolis jene:

— Mi laboras en la topografia sekcio de la partizana armeo kaj, okupante min multfoje pri la penso „iri Eŭropon”, mi klopodis bone informiĝi pri ĉio. La fervojo estas detruita. De la fervojo norden ne kondukas vojo; eĉ se ĝi ekzistus, oni riskus renkonti taĉmentojn de la ruĝa, blanka aŭ japana armeoj. Verŝajne, ni volas eviti bataladon, ĉar nia celo estas reveni vivantaj en Eŭropon. Ankaŭ reiri estas tre duba entrepreno. Ĉe Habarovsk denove estas milita fronto de l' japanoj. Laŭ la fluo de l' rivero Sungari oni po-

---

<sup>1</sup>komprenu „mapon”

vas ja atingi Ĥarbinon, la ĉefurbon de Manĉurio, sed... sed kian koloron havas la registaro kiu estras en Ĥarbino ĉimomente, neniŭ scias. Se estas ruĝa reĝimo, oni mortpafos nin kiel blankulojn. Se estas blanka reĝimo, oni mortpafos nin kiel ruĝulojn. La sola ebleco estas kaj restas: iri okcidenten!

Ni ĉiuj scivoleme atentis, dum li, montrante la landkarton, klarigis:

— Norde de ni estas nek urbo, nek vilaĝo, laŭ la atesto de tiu ĉi karto. Tio signifas, ke la teritorio estas virga praarbaro. Verŝajne, nomadoj indiĝenaj vivas tie, sed kie? Neniŭ scias. Sed rigardu ĉi tien. Du grandaj paralelaj riveroj, Olekmo kaj Vutim, fluas por kuniĝi en la riveron Leno. Nur kelkcentojn da verstoj oni devas iri por atingi la supran fluon de l' menciitaj riveroj. Per flosoj, konstruitaj de ni, la rivero portos nin ĝis Leno. En paca tempo ekzistis vaporŝipa komunikado inter Irkutsk kaj Jakutsk. Eble eĉ hodiaŭ ĝi ne ĉesis tute. De Jakutsk estas distanco de 2 500 verstoj, vere bagatelo por homoj vagantaj, kiel ni. El Irkutsk, memkompreneble, ni vojaĝos per rapidvagonaro.

— Sed ni bezonas armilojn por eventuala defendo. De kie ni prenos ilin?—rimarkis skrupule iu bakisto.

— „Per bastonoj tra la praarbaro”! Estus efika titolo por fantazia romano!—diris iu alia.

— Sen ĉevaloj vojaĝi en la praarbaro estus frenezo!—konsile plendis husaro, kiu ne povis imagi la mondon sen ĉevaloj.

Unu rimarko sekvis la alian kaj fine pro la bruo ni ne povis kompreni eĉ la vortojn de propra najbaro.

— Silenton!—ekkriis la aŭstrianano—ĉevaloj ne estas nepre necesaj kaj armilojn oni povas havigi!

— De kie?!—demandis brue trik-kvar dubantoj samtempe, kaj la ĥaoso de la laŭtaj rimarkoj denove subpremis la kompreneblecon.

— Silentu! Pro diablo! Mi tuj diros! Mi proponas sendi deputitaron al kolonelo Ŝilov, ĉefkomandano de partizanoj (nuntempe prezidanto de D.V.K.<sup>1</sup>) por peti lian helpon. Se li donos helpon,

---

<sup>1</sup>For-Orienta Komandantaro.

bone, se ne, ni riskis tamen nenion.

La proponanto, Hohenberg, kaj mi estis elektitaj, ĉar ni konis plej bone la rusan lingvon. Kaj sole la rusa lingvo estis la plej taŭga por gvidi la pritraktadon.

En la stacidomo de Kseniovskaja staris la vagonaro de la stabo, kaj en la sola kupeo unuaklasa loĝis Dimitrij Ŝilov, iama cara oficiro. En tiun vagonon ni iris por persvadi lin je nia helpo. La adjutanto akceptis nin kun malvarma ĝentileco.

— Kion vi deziras, kamaradoj?

Estis tuj konstateble, ke la adjutanto ne apartenis al la rusaj ĝentiluloj, ĉar, teon trinkante, eĉ ne invitis nin por taso da teo. Tio, laŭ la rusa kutimo, estas ofendo.

— Ni deziras pritrakti gravan aferon kun la ĉefkomandanto.

— Li estas tre okupita. Provu vian aferon aranĝi pere de la stabgeneralato!—li respondis kaj denove duonmalice observis nin.

— Ni povas pritrakti la aferon nur kun la ĉefkomandanto!—ni persistis.

La firma decideco nenie imponis tiomgrade, kiom en Ruslando. Tion ni spertis ankaŭ nun, kiam la adjutanto, post momento, reveninte el la interna parto de l' vagonaro, afable ridetante invitis nin.

— La ĉefkomandanto atendas vin!

Reveninte ni estis surprizite de la ĉefkomandanto de l' stabo.

kaj sentis estetikan ĝuon, sidante sur la mole remburitaj pluŝseĝoj. Ŝilov, mezalta, migdalokula kaj kuprobrunvizaĝa viro, akceptis nin. En la unua momento oni povis rimarki, ke li ne estas pursanga ruso, sed stranga miksiĝo de rusmongolburjata tipo. Por mi,

bo, sed definitivan respondon vi ricevos post 24 horoj.

Ni atendis miraklon kaj ĝi efektive okazis. Posttagmeze de l' morgaŭa tago oni vokis nin al la komandanto. Li estis tre amika kaj tuj ordonis pretigi samovaron por regali nin dum la traktado. Li afable demandis nin pri nia farto. Dum la trinkado de sensuke-  
ra teo li demandis:

— Ĉu iu el vi estas kapabla pretigi novajn landkartojn?

— Tre bone—respondis mi memkonfide.—Ni estas iamaj ofi-  
ciroj kaj kartojn desegni estas infanludo por ni.

— Mi tre ĝojas, ĉar la plano pri evito de batalfronto tra la pra-  
arbaro estas tre genia. Kredu min, ke ne sole via situacio, sed an-  
kaŭ la nia, tiu de l' partizana armeo, estas malcertega. Se la japa-  
noj atakos nin, mi mem ne scias, kien retiriĝi. Oriente, ĉe Haba-  
rovsk, la tranĉeo de l' japanoj baras la vojon kaj okcidente la taj-  
go, kie ni povos nur malsatmorti. Esti kaptitaj de la japanoj estas  
kontraŭ nia gusto. Tio estas la kaŭzo, ke ankaŭ ni serioze pripen-  
sas vian planon. Nia armeo nun estas en mizera stato. Ĉiu soldato  
havas nur kelkdekojn da patronoj kaj replenigon de nenie ni po-  
vus ricevi. Malgraŭ tio, ni volas oferi multon por via afero. Mi  
konas la lertecon diablan de l' militkaptitoj. Ankaŭ nia intereso  
estas trovi elirvojon kaj pro tio ni donos al vi eblecon por plen-  
umo de la plano ellaborita. Elektu 20-30 homojn kaj ni ekipos  
ilin. La intendanto Gruzinska jam havas ordonon tiurilatan. Re-  
kompence ni petas vin desegni kaj pretigi bonan karton pri la far-  
ita vojo, por ke poste ni povu sekvi ĝin, se estos necese!

Kompreneble ne nur la pretigon de karto, sed eĉ ormontojn ni  
estus promesintaj por havi la eblecon plenumi nian planon.

Hejmenreveninte ni estis festitaj de niaj samsortanoj pro la  
granda sukceso.

## IV-a ĈAPITRO

(en kiu estas priskizataj kelkaj karakteroj, kun kiuj oni devos vivi aŭ okaze morti)

### La elektado

La granda laboro komenciĝis. Bone elekti la membrojn de l' ekspedicio kiu estos vaganta tra la praarbaro, ekipi ilin kiel eble plej bone, estis tre grava tasko. La polusvojaĝantoj kaj afrikaj malkovrantoj verŝajne ridetus, eksciinte, kiel mallerte ni komencis la organizadon kaj kiel modestaj estis niaj pretendoj.

200-300 iamaj militkaptitoj vivis en la ĉirkaŭaĵo, kiuj senescepte estis emaj partopreni en ĉia aventura entrepreno, per kiom ajn da suferoj ĝi estus minacinta, ĉar laŭ ilia opinio, la sorto estas tiel mizera, ke kia ajn ŝanĝo povas esti nur pliboniĝo.

Ĉe la elektado—ĉar en la ekspedicio povis partopreni nur 20-30 personoj—la gvidantaj vidpunktoj estis: persona taŭgeco, laborkapablo, specialaj konoj kaj tiel plu. Ankaŭ la amikaj rilatoj estis konsiderindaj. Simpatia vizaĝo havis kelkfoje bonŝancon. Ĉe ni estis tre diversaj la nacieco, aĝo, scio, socia nivelo<sup>1</sup>, klereco, kiuj grave influis la elektadon.

Unuavice havis ŝancon du aŭstrianoj, Dolfi kaj Sepi, ambaŭ partizanoj, kiuj jam de du jaroj vivis en la praarbaro.

Kiamaniere? Aŭstrianoj en la praarbaro? Laŭ ĝenerala kono la nomita nacio vivas en Vieno kaj en la ĉirkaŭaĵo de tiu urbo, kie estas ĉio, krom praarbaro. Tamen tio estis la fakto. Ambaŭ vivis en la praarbaro.

Dolfi kaj Sepi estis militkaptitoj. En la jaro 1918 multaj el la militkaptitoj varbiĝis al la ruĝa armeo. Kiam, ĉe la fino de la somero 1918-a, la blanka reĝimo realmilitis Siberion, la plimulto de la ruĝa armeo estis ekstermita, nur malgranda parto sukcesis forkuri en la praarbaron aŭ inter la montojn. Siberio spite al la trudkoloniado estas loĝata nur apude de l' fervojo kaj riveroj. Miloĵ kaj miloj da kvadratversto senhomaj donas la pli grandan parton de meza Siberio, havanta nur praarbarojn, nomatajn tajgo. Post la

---

<sup>1</sup>*standardo* en la originalo



renversiĝo de la ruĝa reĝimo, Dolfi kaj Sepi rifuĝis en la praarbaron. Malsatiĝinte ili aĉetis de la kamparanoj—vizitante la plej proksiman vilaĝon—panon aŭ aliajn manĝaĵojn por oro aŭ arĝento. Oron ili ja havis, ĝis la provizo de la banko de Ĉita elĉerpiĝis. (La bankon en Ĉita la tiel nomita „anarkiista kompanio” elrabis en 1918.) La vilaĝanoj, malgraŭ la severa malpermeso, helpis la partizanojn per manĝaĵoj. Se vilaĝano estis denunciata pro helpo donita al bolŝevisto, oni bruligis la tutan vilaĝon kaj ekstermis la loĝantaron: virojn, virinojn, infanojn. Tiutempe oni ne distingis inter ruĝgvardiano kaj bolŝevisto. Alia rimedo por akiri la necesajn aĵojn estis elreligo de vagonaro kaj prirabo de ĝia enhavo.

Kiam konsumiĝis la oro kaj kelkajn vilaĝojn senindulge ekstermis la armeoj de la blanka reĝimo kaj de la japanoj, la libera rabista vivo fariĝis preskaŭ ne eltenebla. Oni ĉasis ilin, kvazaŭ la rabiajn hundojn kaj la bona kozaka ĉasistaro kelkfoje mortpafis dum unu tago 20-30 homojn el ili. Sepi kaj Dolfi kune suferis dum tiuj teruraj tagoj kaj longaj monatoj. Tiuj suferoj forĝis fortikan amikecon inter ili.

— Do, rakontu, kio estis la plej terura el viaj travivaĵoj?—mi demandis foje scivole, kiam ni interparolis pri la danĝeroj kaj teruraĵoj de la tajgo.

— Kiam ni manĝis kamaradon Hans.

Dolfi ekpuŝis la flankon de Sepi.

— Ĉu vi ne hontas rakonti tiajn aferojn?—murmuris mallaŭte Dolfi, sed Sepi tamen trankvile daŭrigis la rakonton.

— Tiutempe ni vivis dek kune. En la komenco la anoj de nia grupo estis 30, sed la bonapetita morto digestis ilin. La malsato turmente tordis niajn intestojn, ni nenion havis por manĝi. La lastajn restaĵojn de ĉevalo ni jam estis manĝintaj kaj ĝiajn hufojn kaj felon ni maĉadis malespere. Hans pro la suferoj de la malsato freneziĝis. En malsanulejon ni ne povis sendi lin, ĉar tie ne ekzistas malsanulejo. Se iu malsaniĝis en la praarbaro, aŭ estis vundita, estis nenia helpo por li kaj sen kuracista helpo li fermis siajn okulojn por eterna dormo. Kion ni estus povintaj fari por la malfeliĉa kamarado? Ankaŭ ni estis malsataj kaj... nu, ni manĝis lin. Dum la manĝo ni parolis multe pri lia kaj nia malbenita sorto. Poste ni manĝis ankaŭ iun alian, sed tiu meritis tion, lin ni punis

pro lia kulpo. Li ŝtelis el nia provizo nutraĵon... sed lia viando estis pli bongusta... Ĉu ne, Sepi?

Mi kuraĝis rakonti ĉi tiun teruran epizodon nur pro tio, ke ni

mojn”.

Verdire, por vojaĝo tra praarbaro oni ne povas elekti ĉiuokaze unuarangajn ĝentilhomojn. Sepi kaj Dolfi havis gravajn kvalitojn por esti elektitaj. Ili, vivinte du jarojn en la praarbaro, estis spertuloj kaj ni bezonis por la riska vojaĝo tiajn homojn. Demandinte ilin pri ilia partopreno en la vojaĝo malfacila, ili respondis: „Kun la plej granda plezuro, sed labori ni ne volas dum la vojaĝo. Ni vivas jam de du jaroj en la arbaro sen laboro kaj ni tute ne deziras labori plu en ĉi tiu vivo!” „Ni ne meritas tion!” aldonis Sepi. Post longa parolado ni interkonsentis, ke ili ne devos partopreni en laboroj malfacilaj.

Ni volis antaŭzorgi pri ĉio antaŭvidebla. Kio okazos, se la kunportita nutraĵo konsumiĝos? De kie ni prenos manĝaĵon?

— Ni ĉasos kaj fiŝkaptos! estis la decido—la arbaro estas riĉa je bestoj. Uroj, ursoj, cervoj, aproj amase troviĝas. La riveroj estas fiŝplenaj:

— Ni ne malsatmortos!—mi asertis memkonfide.—La tasko estas: akiri ĉasistojn kaj fiŝkaptistojn!

Baldaŭ ni havis ankaŭ ĉasiston. Vivis inter ni unu, kiu asertis, ke pactempe li estis ŝtelĉasisto sur la bienego de Eszterházi. Kun granda ĝojo li estis elektita ĉeforganizanto de la ĉasado. Ĉiu membro de nia ekspedicio meritis kelkajn paĝojn skribitajn pri lia karaktero aŭ senkaraktereco. Laŭ okupo, aŭ laŭ plej karakteriza trajto oni povas dividi la partoprenantojn jene: Unu idealisma advokato; du normalaj agronomoj; unu oficisto, sed poeto en animo: du studentoj; unu lakeo; du seruristoj; unu aktiva suboficiro;

harojn, surmetinte pantalonon ŝi sekvis sian amaton. (Por historia aŭtentikeco mi devas menci, ke ŝi estis ok jarojn pli aĝa ol sia amato.)

Bone zorgante pri ĉio, fine post du-tri tagoj ni estis kolektintaj ĉion, kion ni bezonis: de medikamentoj ĝis kudrilo kaj fadeno. La intendantaro donis ĉion, kion ĝi havis, sed bedaŭrinde ĝi tre malmulton havis. La plej grava problemo estis la demando pri ĉevaloj. Ni petis 25 ĉevalojn kaj laŭ la konsento ni estus devintaj reŝendi ilin, atinginte la riveron. La partizana komandantaro jam asignis la ĉevalojn, sed la ĉevalojn tamen ni ne havis, ĉar ne estas facile ĉevalojn ricevi de partizano. La juna partio de l' ekspedicio volis ekiri... perpiede. La maljunaj kaj la lamaj partizanoj insistis, ke sen ĉevalo oni ne povas vojaĝi tra la praarbaro. Du partioj estis do: ĉevalpartio kaj senĉevalpartio. La vetero favoris al la unua. Pluvis, pluvis, tutajn tagojn kaj noktojn.

— Iru do sen ĉevaloj!—mokis nin la kontraŭa partio.—Kiama-niere vi volas treni la nutraĵon, kiam, eĉ sen ŝarĝo, oni dronas en la koto en tia vetero?!

## V-a ĈAPITRO

(kiu montras, ke la antaŭenirado, kiel ĝenerale en la vivo, tre malrapide okazas)

### La unuaj malhelpoj

La eksterordinara vagonaro haltis. Jen la ekirpunkto de nia vojaĝo! Ni desaltis kaj rapide elmetis nian havaĵon. Paralele kun la fervojo estis unu rivereto, nome Ĉornoj Urjum. Laŭ la programo ni devis transiri ĝin. Sur la landkarto ĝi estis desegnita kiel eta rivero, kies transiron nenio malhelpas. Tiom pli da malhelpoj ekzistis reale. Ni intencis tuj antaŭeniri kaj fari kelkajn verstojn, sed apenaŭ ni marŝis kelkajn centojn da paŝoj, ni trovis anstataŭ rivereton: ŝaŭmantan, bruegan, potencan riveregon.

„Neniam ni transiros ĉi tiun monstron!” kriis longegulo, al kiu ni donis la epiteton „grandbuŝulo”, kiun titolon li vere meritis poste. Ni ĉiuj konvinkiĝis, ke engluti ni ne povas la riveron, ponto ne ekzistas. Ne restis io alia, ol konstrui tendon. Apud la fervojo ĉe lageto ni starigis ĝin. Ni havis malgrandan, akvorezistan<sup>1</sup> tendon, en kiu dek personoj povis retiriĝi. Pluvis bele, egalmezure, konstante. Ni estis jam tiel malsekiĝintaj, ke ni sentis la korpon saliva, mucida, malseka spongo.

Kontraŭ la malsekeco fine Dolfi havis bonan ideon: „Senŝeligu la arbojn kaj la ŝelo servos kiel kontraŭakva kovrilo.”

Ni komencis. Komence iomete mallerte ni laboris, sed poste per akrigitaj lignopecetoj la laboro prosperis. La basto faris bonan servon, ni estis defenditaj kontraŭ la senĉesa pluvo, sed nia humoro estis kiel antaŭe: maldolĉa, nebula. La senŝeligitaj, nudaj arboj aspektis kvazaŭ misteraj, grandaj kandeloj. Ili estis la solaj atestantoj de nia malbenita situacio.

Kion fari? Kio helpos? Kelkaj centoj da paŝoj kaj grandega monta rivero terure bruante baras la vojon. Kiamaniere atingi la alian bordon? Respondon neniu povis doni. Por konsiloj ni vizitis ankaŭ la fervojlaboristojn troveblajn en la ĉirkaŭaĵo. Ili diris nur tion, kion ni jam delonge sciis. Ponto ne ekzistas. Unu ponto ja

---

<sup>1</sup>akvofirman en la originalo

ekzistas, sed 150 verstojn malproksime, suddirekte. La rivero estas nur pro eksterordinaraj pluvegoj tiom granda, sen tio ĝi estas ordinare trairebla eĉ por infanoj. Mil- kaj milfoje ni demandis: „Kiamaniere ni povus veni la transan bordon?” „Se la akvo pli malaltiĝos”, oni respondis.

„Kaj se monatlonge pluvos?” „Oni devas monatlonge atendi”, estis la apatia respondo.

„Kontraŭ la dioj vane oni batalas!” diris Goethe<sup>1</sup>. La verecon de tiu ĉi sentenco ni sentis, kiam ni vidis, ke pluvas, pluvas, seninterrompe pluvas. La plimulto estis tre nervoza<sup>2</sup> kaj kelkaj volis provi la transiron spite al ĉiuj malhelpoj, aliaj de ia savanta propono, aŭ de la veterŝanĝo esperis la solvon. Malfeliĉe, kvankam jam estis monato junio, la rivero estis tiom malvarma, ke oni ne povis eĉ dum sekundoj teni la manojn en ĝi. Pri longdaŭra laboro en akvo eĉ paroli estis vane.

Atendi estis la sola kaj plej komforta solvo.

La sekvinta tagiĝo donis novan malagrablajon. Krioj, ekscititaj rimarkoj rompis la silenton. La deĵoranto tremante rakontis, ke du kadavroj kuŝas sur la fervojreloj. Du ĉevalojn nokte transiris la vagonaro. Kiu spertis, ke en tia distrikto kiel grandvalora trezoro, amiko kaj kunhelpanto estas la ĉevalo, nur tiu komprenos la malfeliĉon, kiu trafis nin. Se ne du ĉevaloj, sed kvar homoj estus mortintaj, ni ne estus tiel konsternitaj. Kio kaŭzis la malfeliĉon, oni povis konjekti. Mi jam menciis, ke la plej diversaj homoj kunvenis en la ekironta societo. Inter ni estis kelkaj urbanoj, kiuj neniam vidis ĉevalon el proksimo. Pri la zorgado de l' ĉevalo ili kompreneble ne havis eĉ ideon. La estinta husaro, kiu organizis la ĉevalaferojn, kiel reĝo eldonis la ordonon: „Ĉiujn ĉevalojn kunligi, piedojn kateni kaj poste lasi ilin, ke ili paŝtiĝu.”

La ĉefĉevalmajstro montris, kiamaniere oni devas la ĉevalojn kateni, ke ili ne forkuru. Sed kelkaj el ni ne havis la deziritan spertecon. Ili, kiel filozofoj, sciis, ke ne estas agrable suprenlevi la ĉevalpiedojn, se oni ne estas asekurita kontraŭ la piedbato de

<sup>1</sup>Johann Wolfgang von Goethe (1749-1832), germana verkisto

<sup>2</sup>*nervema* en la originalo

ĉevalo.

Verŝajne la ĉevaloj ne estis plej bone kunligitaj, la ŝnuro defa-  
lis kaj la ĉevaloj disvagadis. Du ĉevaloj estis sur la reloj, kiam tre

*malrapide venis la ungarano. Dek kvin ĉanta vagonaro en ordo*

La tendarfajro apenaŭ brulis kaj volis pro la malseko estingi—kiel mia espero.

## VI-a ĈAPITRO

(en kiu vi legos pri la grandaj fortostreĉoj, per kiuj eble montojn oni povus ekmovi)

### La transiro

Matene, je la kvara horo okazis la vekigo. Nur la suno estis pli diligenta ol ni, ĉar ĝi pli frue leviĝis. La arboj estis troŝarĝitaj de la akvo. Se oni tuŝis ilin, kvazaŭ pluvego komencis fali de la folioj. La tero estis mola, tiel ĝi plensuĉiĝis per akvo.

La malfacila laboro komenciĝis. La grandan silenton de l' virga tajgo ni rompis per hakila, segila bruo. Kun granda fervoro ni laboris. Ekzistis inter ni kelkaj, kiuj ĝis nun neniam gustumis la fizikan laboron. Ĉe ili la granda fortvolo kaj ambicio anstataŭis la mankantan lertecon. Ĉe ĉiuj fizikaj laboroj estas grava la spertula uzo de l' instrumentoj, kiu plifaciligas la laboron kaj helpe de kiu per duonforto oni povas atingi duoblan sukceson. Mi devas konfesi, ke kelkaj el ni tute ne konis la principon de la fortekonomio kaj la lertuloj ofte ironie ridetante rigardis, kiamaniere la idealisma advokato tenas en siaj manoj la hakilon. Ankaŭ malicaj rimarkoj ne mankis.

La 15-metrojn longajn detranĉitajn arbojn vere per superhoma peno ni sukcesis porti al la bordo. 13-14 personoj portis kelkfoje tian arbon, tamen ni sentis ofte, ke nia ŝultro ne eltenas la ŝarĝon kaj disrompiĝos. Tri longajn trabojn ni kunmetis kaj tio donis la longecon de la ponto.

Ni ofte sentis la mankon de plena teknika ekipado. Ni ne havis sufiĉe grandajn fernajlojn, tial ni laboris per lignaj najloj kaj bariloj. Dumtage 12-hora laboro kaj post tri tagoj ni jam fiere rigardis la rezulton: la pontskeleto prete kuŝis sur la bordo.

Dum la trolaciganta laboro ni malmulte observis la veteron. Ĝi estis vere freneza. Jen serene blua ĉielo, la suno brilas, jen subite fariĝas pluvego. Kiel grandmonda sinjoro dekfoje vestiĝas dumtage, tiel la kaprica vetero ŝanĝiĝis dekfoje.

Sed ni apenaŭ okupiĝis pri la veterŝanĝigo, ĉar nur la ponto nin interesis. Se nia plano sukcesos... Se la ponto estos sufiĉe longa: la unuan grandan malhelpon ni venkis. La unua venko alpor-



tas la aliajn, ni opiniis.

Grandaj preparoj estis necesaj, kiam ni volis puŝi la ponton en la akvon. Ĉiuj estis mobilizitaj. La partizana komandanto mem ĉeestis kaj donis al ni 20 kozakojn kiel helpantojn. Ni intencis glitigi la skeleton per glataj arboj sur akvon.

La agronomo, kiu faris la planon, donis ordonojn: „Fiksu per ŝtonoj kaj ŝnuroj la antaŭan parton de la ponto!”

„Tenu en viaj manoj tiun ĉi metalfadenon.”

„Kial vi ne laboras?”

„Mi laboras, sed la kozakoj faras nenion.”

„La ŝnuro ŝiriĝis!”

„Venu tri homoj ĉi tien!”

La ordonoj kaj kontraŭordonoj estis multnombre aŭdeblaj kaj kun granda intereso ni atentis, kiamaniere turnas la akva forto la ponton al la alia bordo. Timante, ke la ponto ne estos sufiĉe longa, ankaŭ meze ni retenis ĝin per dikaj metalfadenŝnuroj kaj nur malrapide ni lasis ĝin turniĝi. Laŭ ĝenerala scio la ligno estas pli facila<sup>1</sup> ol la akvo kaj ĝi restas surface de l' akvo. Sed ĉe nia ponto ne tiel okazis, kiel ni lernis el la fizika lernolibro. La ponto faris potencon malhelpon al antaŭenirantaj akvamasoj kaj mirigite ni rimarkis, ke la mezan parton de l' ponto la akva forto premas sub la akvon. Ni vidis nur la antaŭan kaj malantaŭan partojn, la mezo estis 40-60 centimetrojn profunde en la akvo.

Tiu ĉi cirkonstanco malebligis la pluan laboron. Ĉio estis vana. La laboro kaj fortostreĉo ŝajne perdiĝis. Unu eblaĵo estis savi la situacion: per subkonstruaĵoj suprenlevi la mezan parton. Sed la glacie malvarma akvo ne permesis la laboron.

„La malsukceso malofte promenas sole kaj kiu kuŝiĝas kun sinjorino Zorgo, tiu ankaŭ leviĝas kun ŝi” diras burjata proverbo. Profunde deprimis nian fizikan kaj moralan forton la malsukceso kaj ni baldaŭ ricevis eĉ novajn sortobatojn.

Kiam la partizana komandanto vidis, ke nia plano malsukcesis, li deklaris, ke li reprenas la donitan mandaton. Li scias, ke ni jam perdis du ĉevalojn, tial li repostulas ankaŭ la donacitajn ĉeva-

---

<sup>1</sup>komprenu „malpeza”

lojn. Ĉiu povas iri kien la okuloj vidas, aŭ povas resti kiel laboristo ĉe la partizana armeo.

Interne ni tre ekscitiĝis pri la nova malbono, sed ni devis resti prudentaj kaj provi aliigi la decidon per marĉando. Dum la interparolado klariĝis, ke la afero havas pli profundan kaŭzon. La komandantaro ŝanĝis entute la originalan planon. Pro la japana danĝero ili volas ankaŭ por plenaj armeoj ebligi la praarbaran vojon. Grupo da rusaj ekspertizistoj faros la karton kaj, laŭ ĝi, laboristoj preparos la difinitan vojon. Ni povas resti kiel simplaj laboristoj kaj nia tasko estas fari ireblaj por ĉaro la unuajn 40 verstojn. Post plenumo de tiu tasko ni havas la rajton iri tra la praarbaro.

„Sed sen ĉevalo ni ne povas labori!” „Kiu portos la nutr-aĵon?” — intervenis nia deputito.

„La ĉevaloj mankas ankaŭ al la partizanoj mem. Niaj husaroj batalas sen ĉevaloj” — respondis la komandanto. Post longa pripa-rolado tamen li lasis ĉe ni dek ĉevalojn.

„Kiu ne estas kontenta pri mia decido, tiu povas reiri.”

Nun ni vidis, kiel enradikiĝis la ideo de la praarbara vojo. Nur kvin personoj decidis reiri.

Ili provis konvinki ankaŭ nin. „Ĥimero estas via plano! Neniam ĝi prosperos, ĝi nur pereigos vin.” Sed ili vane parolis.

Foje mi vidis amerikan teatraĵon: „Superakvego” estis la titolo. En tiu ĉi dramo, kiam la espero savi la vivon jam malaperis, la homoj estas afablaj, amindaj, ĝentilaj.

Mi ne spertis, ke la proksimeco de l' morto plibonigas la homon. La memamo regas ĉiam ĉe la plej granda parto. Mi rememoras, kvankam la reirantoj sciis, ke ni ludas kun la morto kaj eta aĵo povas eble savi vivojn, du el ili „forĝesis” redoni kelkajn ilojn kaj nur nia rajdanta patrolo, atinginte ilin, povis ĉion reakiri de ili.

Nia vivo estis plena de okazaĵoj kaj ĉiu momento donis novan surprizon. Kiam ni matene rigardis la riveron, la ponto jam ne ekzistis. Dum la nokto la fluo tiel grandiĝis, ke la tri metalfadenŝnurojn la forto de la akvo disŝiris kaj la ponton kunportis. Kiel ni poste aŭdis, nia ponta konstruaĵo detruis la bonan ponton, kiu ekzistis 150 verstojn sude de ni. Nia granda laboro ne nur ne utilis al ni, sed nur malutilis al aliaj.

La epizodo finiĝis kaj nova laboro komenciĝis, sed nun sub

la gvidado de l' rusa majstro. Ni provis konstrui ordinaran ponton. La lignojn oni devis porti de proksima loko. Sed la ankaŭ nova konstruo ne sukcesis, ĉar la rapida fluo ĉiam dronigis la lignojn.

Dumtempe ni ricevis boatojn. Kia ĝojo! Ni komencis fari pontonon. Unufoje ni vere atingis la alian bordon, sed dum la reveno la ondoj superakvigis la pontonon kaj nur per granda laboro ni savis la boatojn. Dek tagojn daŭris la tempo de l' provoj. Fine sukceso. Ni fiksas boaton sur metalfadenŝnuro, ligita inter la du bordoj. Sur tiu ĉi boato ni transportis la havaĵon. Ni dispecigis eĉ la ĉarojn por la transportado. La ĉevalojn ni naĝigis.

Ankaŭ malgranda malfeliĉo—ĉefe por gastronomoj—okazis. Nia plej kara bovido saltis el la boato kaj forkuris.

## VII-a ĈAPITRO

(kiu pruvas, ke kelkfoje estas agrable se oni estas persekutata)

### La persekuto

Ni atingis la transan bordon. Tiu ĉi rezultato, rilate, estis ja nur bagatelo sed por ni ĝi signifis tre multe. Ni pli optimiste prijuĝis nian aventuran entreprenon. Agrable estis vespere, kiam ni ripozis en la tendo. Meze brulis freŝaj branĉetoj por defendi nin kontraŭ la kuloj. Ni kuŝis kun fermitaj okuloj sur la herblito kaj diskutis aŭ diris spritaĵojn, aŭ la idealisma advokato faris grandan paroladon pri la valoro de la vivo aŭ pri la mekanika kaj spirita percepto de l' mondo. Ŝajnis al ni, ke ankaŭ la praarbaro havas pli belan aspekton. Ĉie arboj, arbegoj, arbetoj en ĉiuj nuancoj de l' verda koloro. La potencan vivkapablon de la naturo montris la titanaj arboj, kiuj jam de centoj da jaroj vivas kaj kreskas tie ĉi.

La pompon de la naturo iom kontrastis la simpleco de la ĉiutaga nutraĵo. Ni manĝis plejparte nur sekigitajn, salitajn fiŝojn kaj panon. Sed iun matenon faris grandan malkovron nia agronomo.

— Vidu kion mi trovis! — kriis li kun entuziasmo. Li trovis morusojn, kiuj postrestis de la pasinta jaro sub la folifalaĵo. Ni jam tre longe ne gustumis fruktojn kaj la acideco de la fruktoj bonege gustis al ni. Do granda estis la ĝojo, kiam estis komandite kolekti morusojn por la komuna kuirejo. Tiu ĉi laboro estis sendube pli facila, ol la segado aŭ branĉkolektado.

Dum la moruskolektado malĝoje ĝemsopiris la studento: „Kiel bedaŭrinde, ke la agronomo ne trovis ankaŭ sukeron kaj grason!” kaj li plenbuŝe glutis la acidajn fruktojn.

Tiu ĉi epizodo ne influis la gravan taskon: la vojfaradon. Ni laboris 11-12 horojn tage. Jam je la kvara horo matene la noktgardanto vekis nin kaj vespere je la deka ni povis kuŝiĝi. Ĉiu tago portis novan zorgon. Ne estas infanaĵo la irebligado de marĉo. Ni metis palison post paliso, kaj sur la palisaro ni iris malrapide antaŭen kun niaj ĉaroj. Kaj kiu ne provis, tiu certe ne kredas, kiel malfacile estas jungi ĉevalojn. Multajn el ni malagrable surprizis, kian lertecon, elpensemon kaj kiom da artifikoj oni bezonas por tio. La plej diversaj rimenoj, ŝnuroj pendis de la jungilaro kaj

malbone ligi ilin havis tute neatenditajn sekvojn. Ĉiam okazis io malagrabla. Kaj se la ŝnuroj estis bone ligitaj, certe la rado saltis for de l' akso, ĉar la radnajlo ne eltenis la premon de la ŝarĝo.

La ĉevaloj vivis en granda honoro, kaj pli bone estis ne naskiĝi al tiu homo, kies malzorgemo kaŭzis eble piedrompon aŭ dorsvundon al iu ĉevalo.

Tagon post tago pli neeltenebla fariĝis nia vivo pro la muŝoj kaj kuloj. Ĉiu horo havis sian specialan muŝspecon. Antaŭtagmeze kaj nokte ĉefe kuloj, tagmeze muŝegoj, posttagmeze muŝetaro. Kaj ili ekzistis en nekalkulebla kvanto. Kelkfoje ili atakis nin vere furioze, kaj ni vane defendis nin, niaj buŝoj kaj okuloj estis plenaj de ili. Kulretojn ni ne havis kaj la memfaritaj tukoj ne defendis nin sufiĉe. Pro la pikoj, niaj kapoj aspektis kelkfoje kvazaŭ kukurboj. La ĉevaloj suferis ankoraŭ pli multe ol la homoj. Per konstanta gestado ni peladis la muŝaron, kiu suĉis nian sangon, sed niaj malfeliĉaj ĉevaloj estis senhelpaj, ĉar ilia vosto ne povis forpeli la milionojn da muŝoj kaj kuloj. La grizkolora ĉevalo estis tute nigra, tiel ĝian korpon kovris la kuloj kaj la sursekiĝinta sango. Ĉe ĉiu ripozado, tuj post la halto, ni faris grandan brulŝtiparon, kaj per la fumo ni provis defendi la ĉevalojn.

Ankoraŭ la prudentaj ĉevaloj sentis la kulojn kaj muŝojn.

– Ni laboris multege, kaj niaj veturiloj transvenis. Se niaj ĉaroj transvenis, do aliaj same bone transvenos—estis nia respondo.

Fine la laborgvidanto diris, ke li raportas ĉion al la komandanto, sed li ne kredas je nia forpermeso.

Ni jam spertis kelkfoje, kion signifas raporto. Novajn traktatojn, novan prokraston kaj novan tempoperdon, eble kelkajn monatojn.

Kelkaj el ni estis ekstreme ekscititaj, aŭdinte la aferon.

– Mi ĉiam diris, ke la rusoj trompis kaj trompos nin!—diris la estinta lakeo.

– Ni estus devintaj forlasi ilin jam antaŭlonge, sed niaj „sinjoroj” nin ĉiam malbone influis—kriis la grandbuŝulo.

Ni ne havis multe por perdi. Ni kalkulis niajn havaĵojn kaj decidis. Ni havis kvar sakojn da pano, kelkajn pudojn da rizo kaj kajo, unu pudon da salo. Kiel rezervo povis servi niaj ĉevaloj, kaj ni certe trovos bestojn, fiŝojn en la praarbaro. 60 funtoj da nutraĵo estis kalkulataj por ĉiu persono, ŝpareme ĝi sufiĉas por unu monato kaj duono. Ni havis ankaŭ 9 pafilojn, sufiĉon da diversaj hakiloj, segiloj, boriloj, ŝnuroj kaj aliaj instrumentoj. Ankaŭ kompasoj kaj akvoskizojn ni havis. Ŝanĝobjektoj, kiel najloj, alumetoj, pafkugloj, mono estis je nia dispono.

Ni estis ĉiuj sanaj, vivemaj kaj ni decidis post mallonga pripenso foriri sen permeso.

Du el ni prenis sur sin la taskon, rerajdi kaj rompi la komunikadon kun la mondo: tranĉi la metalfadenon. Ni, ceteraj komencis labori kun febra rapideco. Ni ne volis kunporti la ĉarojn, anstataŭe ni fabrikis memkonstruitajn pakŝelojn. La vojaĝantoj dividiĝis en 10 grupojn. 2-3 homoj devis zorgi pri unu ĉevalo kaj helpi ĝin, se estos necese. Ĉiu havaĵo, kiu estis pakita sur la ĉevaloj, estis deklarita komuna propraĵo. Se iu portis sur sia dorso ion, tio estis lia privata afero.

Ankoraŭ ne krepuskis la mateno, kiam la senditoj ŝvitante revenis kaj ni, kiel granda karavano, ekiris. Ni fieriĝis, rigardante la bonŝarĝitajn ĉevalojn, la zorgemajn homojn kaj la belajn arbojn, kiuj salutis nin per kapklinoj en la vento.

Trovi la vojdirekton estis tre simple. Ni iris apud la bordo de rivereto, kiu fluas en la riveron Alekma. Ni rapidis, tamen ni de-

vis multfoje halti, ĉar haltsignalo, farita per pafo, estis aŭdebla. Jen ŝnuro malligiĝis, rimeno ŝiriĝis, jen iu selo ne estis en ordo kaj oni devis denove komenci la pakadon.

Apenaŭ ni iris ses horojn, kiam eksonis tri pafoj. Laŭ la konsento tri pafoj estis la danĝersignalo. Ni ĉiuj kuris—escepte Sepi kaj Dolfi, kiuj restis ĉe la ĉevaloj—en la direkto de la pafoj. En la densa arbaro kuri estis tre malfacile kaj ni kuris pene kaj lukte, kaj ne havante eĉ tempon por pripensi, kia danĝero minacas nin. Kiam ni alvenis, ni vidis nur ridetantajn, interbrakumantajn homojn, niajn kaj fremdajn.

Kio okazis? Kiel venis fremduloj inter nin? Post kelkaj minutoj ĉio klariĝis. Kiam la partizankomandanto eksciis, ke ni foriris, li tuj ordonis al la kozakoj, kiuj postenis ĉe la rivero, ke ili persekutu nin, konfisku nian havaĵon. Sed la helpboato ne estis jam sur sia loko kaj nur 6 kozakoj sukcesis tranaĝi kun ĉevaloj la riveron. Inter ili estis tri, kiuj estis ruslandanoj kaj jam delonge sopiris hejmeniri iamaniere. Nun ŝajnis bona okazo. Ili anoncis sin sekvi niajn postsignojn, sed fakte ili volis atingi la patrolandon.

—Permesu—diris la plej maljuna, kies hararo pendis ĝis la okuloj—ke ni iru vian vojon, kaj ĉio, kion ni havas, estu ankaŭ via!

—Hura!—ni kriis unuanime.—Vivu niaj kozakaj fratoj!—aldonis kelkaj kriante.

Granda feliĉo estis por ni la kozakoj. Tri bonaj ĉevaloj kaj pafiloj signifis grandan valoron, kvankam ankaŭ la stomakoj plimultiĝis.

Sed nun rapide antaŭen! Ni dividis denove la pakajojn kaj malpezigis niajn ĉevalojn. Je malfrua vespero ni haltis. Por festi la tagon duobla rizporcio estis disdonata. Grandajn brulŝtiparojn ni konstruis. Kiam ni sidis apud la fajro kun vizaĝoj nigraj pro la suno, kun profiloj akre lumigitaj per la ruĝa ŝtiparlumo, ni aspektis kvazaŭ indianoj.

Post tri tagoj da marŝo, sen ia notinda okazaĵo ni atingis la riveron Alekma.

## VIII-a ĈAPITRO

(en kiu ekscias la leganto, ke sovaĝuloj ne nur en Eŭropo ekzistas, sed ankaŭ en orienta Siberio)

### Ĉe la araĉonoj

Ni multfoje sentis ĝis nun, ke vanaj estas homa scio, prudento, volo, sinofero, ĉar kontraŭ la forto kaj ludo de la naturo ni ne povas gajni la batalon. Ĉu brilas la suno, aŭ pluvas, ŝajne estas sensignifaj faktoj, tamen influas la vivon de milionoj.

Ni parolis ĉiam kun certa maltrankvilo pri la rivero Alekma. Laŭ la karto ĝi estas multe pli granda ol Ĉornoj Urjum kaj ni kalkulis minimume 3 tagojn ĝis la atingo de la transa bordo.

Sed male okazis.

Sortmalbenitaj ni estis ĉe la Urjum, feliĉon ni havis ĉe Alekma.

Jam de tagoj estis trankvila, bela vetero. La ĉielo pompis en serena, blua koloro. Sinjoro Suno brilis konstante. Ne pluvis, kaj la sekeco malaltigis la riveron. Alekma havis seriozan, duonni-gran koloron. Ĝi estis rapidflua, sed kondukis kiel bona infano, ne faris grandan bruon per siaj ondoj.

Eĉ la ĉevalojn ni ankoraŭ ne malŝarĝis, kiam du naĝantoj jam elprovis la profundecon kaj rapidecon de la rivero.—Mi vetas je mia hodiaŭa sekpano, ke la rivero ne estas travadebla!—kriis la ĉiam pesimisma studento.

—Ni laboros kelkajn semajnojn, ĝis ni transiros ĝin—aldonis iu alia.

Sed la pesimismo ne praviĝis en tiu ĉi okazo. La rivero ne estis pli profunda ol du arŝinoj kaj sen grandaj preparoj estis trair-ebla por homoj kaj bestoj.

Por kontraŭstari la puŝforton de la akvo, ni prenis en la manojn bastonegojn. Kelkaj kunligis sin reciproke. Senprokraste ni ekiris kaj feliĉe, sed lace, ni alvenis sur la velurmolan sablon de la transa bordo.

Por festi la feliĉan tagon ni decidis aranĝi ripoztagon kaj dum tiu ĉi tago fari grandan sinlavadon. La ripozon ni vere meritis kaj ankaŭ la sinlavado estis nepre necesa. Kun niaj eksterajoj oni vere



ne estus povinta prezenti sin en salonoj. La vestaĵoj estis disŝiritaj. La ŝuoj, kiuj antaŭ kelkaj semajnoj estis tre taŭgaj kaj fortaj, estis nun apenaŭ uzeblaj. Niaj ĉemizoj ricevis pro la ensekiĝinta ŝvito duonnigran koloron. Nia kapo estis abunde kovrita de haroj, lipharoj kaj barbo. Vi, kiuj vivas en normalaj cirkonstancoj, neniam ĝuas la feliĉon, kiun donas la demeto de trisemajne malpura ĉemizo kaj la surmeto de freŝpura. La plejmulto el ni riparis sian vestaĵon aŭ beligadis sian korpon, dum kvar el ni foriris surĉevale por serĉi la araĉonojn.

Araĉonoj! Ni jam multfoje aŭdis tiun nomon. Delonge ni sciis, ke en la ĉirkaŭaĵo de la rivero Alekma vivas indiĝenaj nomadoj, tiele nomitaj. La demando estis: kiel trovi ilin? Tuj, alveninte, ni pafadis por rimarkigi nin. Nenia rezulto. Por ni signifus grandan feliĉon la eventuala trovo de araĉonoj. Eble oni povas akiri de ili nutraĵon, ili povos servi kiel gvidantoj. Kun granda sciavolo ni atendis, ĉu sukcesos la araĉonserĉado. Jam pasis 3-4 horoj kaj niaj kamaradoj ne revenis.

— Certe ia malfeliĉo malhelpas ilin—estis aŭdeble en iu grupo. Tiun rimarkon faris, okaze, ne la ĉiam pesimisma studento sed iu kamarano.

— Povas esti, ke la araĉonoj kaptis kaj mortigis ilin—opiniis iu alia.

— La araĉonoj estas la plej honestaj homoj en la mondo—defendis ilin Dolfi kiu partoprenis en la interparolado—kaj ankaŭ Sepi ne lasas, ke oni mortigu lin,—aldonis li kun memfido, kiu ne estis senbaza ĉe homo vivinta jam du jarojn en praarbaro.

— Sed kio povis okazi, ke ili ne venas?—demandis denove iu.

— Verŝajne ili nenion trovis kaj ilin ĝenas hejmenveni senrezulte—estis la konkludo de la plimulto.

Tiaj interparoloj havis tre interesan karakteron. Ni uzis tri lingvojn: la germanan, la hungaran kaj la rusan. Kiel internacia helpolingvo servis ĉefe la rusa, sed ankaŭ la mansigna parolo ludis sufiĉe gravan rolon.

Jam estis tre malfrua posttagmezo, kiam la kamaradoj revenis kaj kriis de malproksime:

— Ni trovis ilin!

Ni tuj ĉirkaŭis la revenintojn kaj superŝutis ilin per demandoj.

– Kie, kiam, kiun vi renkontis? Kiel ili aspektas?

– Kiamaniere ili vivas? Ĉu estas vere, ke ili havas nur cervojn? Ĉu ili gvidos nin? Ĉu ili timis?—Kompreneble ne estis facile respondi je ĉiuj demandoj.

Niaj kamaradoj vagadis jam kvar horojn, kiam ili trovis la araĉonan vilaĝon: virojn, virinojn kaj infanojn. La araĉonoj tre miris vidante la fremdajn homojn. Nur unu estis inter ili, kiu jam interrilatis kun rusoj. Estis do tre malfacila la interkompreno. Post longa klarigado ili komprenis ke ni estas migrantoj irantaj al okcidento kaj ni estas tre riĉaj je objektoj. Pro la lasta kaŭzo ili konsentis tuj viziti nin por ŝanĝi objektojn. Niaj kamaradoj devis antaŭrajdi por sciigi nin, kaj prepari la ĉevalojn. La araĉonoj venos sur kurcervoj kaj la ĉevaloj eble timos la cervojn.

– Ili jam venas!—atentigis nin la deĵoranto. Vere, oni povis jam vidi la interesan karavanon konsistantan el 30-40 homoj. Ili rajdis sur kurcervoj. La cervoj estis tre delikataj, nervozaj kaj graciaj bestoj. Kelkaj el ili havis kornaron el 12-16 branĉoj. La viroj sidis unuope sur la cervoj, la virinoj kun 2-3 infanoj kune... La vestaĵoj estis egalaj<sup>1</sup> ĉe viroj kaj virinoj. Ili konsistis el cervofelo.

Laŭ aspekto la diferenco inter viroj kaj virinoj ne estis granda, sed oni devas konfesi ke la felo de la virinoj ne estis tiel uzita kiel tiu de la viroj.

Tuj oni povis rekoni la mongolan tipon. La mallarĝa, oblikva, karakteriza okulbreĉo, la elstarantaj vangostoj kaj malpintaj nazoj faris ilin tre similaj al la rasoj vivantaj en Orient-Siberio: al la jakutoj kaj burjatoj. La infanoj estis malbele kreskintaj kaj multaj el ili havis ĝibon.

Pro la renkonto estiĝis sincera, viva ĝojo ambaŭflanke. Al ni plaĉis pleje la cervoj kaj la infanoj, kaj post kelkaj minutoj ni jam tute amikiĝis al ili. Por montri nian riĉecon ni tuj aranĝis ekspozicion. Post horduono ni jam solene malfermis ĝin. Centdek objektojn ni elmetis. La publiko miris pri ĉio, ĉefe plaĉis al ili nia teleskopeto, la poŝfajrofarilo kaj niaj batistaj naztukoj; la foiro havis vere brilan sukceson. La araĉonoj kvazaŭ atakis nin por ŝanĝi

---

<sup>1</sup>komprene „samaj”

siajn objektojn kontraŭ la niaj. Ili invitis nin viziti la araĉonan vilaĝon. Kaj ni decidis plilongigi nian ripoztempon kaj viziti niajn gastamajn novajn konatulojn.

## IX-a ĈAPITRO

(en kiu estas priskribataj kelkaj karakterizaj trajtoj de la nomada vivo)

### En la araĉonvilaĝo

Kie malgranda rivero fluas en Alekmon, apud abunderiĉa paŝtejo ni trovis la araĉonan vilaĝon. Ne imagu ion grandiozan sub la nomo „vilaĝo”. La tuta tielnomita vilaĝo konsistis nur el kvar tendoj. Betullignoj donis la skeleton kaj betulkrusto servis kiel kovrilo. Kiel blankaj konusoj staris unu tendo apud la alia. Ilia diametro estis ne pli longa ol 5-6 metroj, kaj en unu tendo loĝis 8-12 personoj, farante unu familion. 4-5 familioj estis jam tribo. Ĉiu tribo loĝis aparte. Tian tribon ni trovis nun.

„Kiel ĉarmaj estas la tendoj!”

„Ĉu vi jam trinkis cervinlakton?”

Tiaj rimarkoj kaj demandoj estis aŭdeblaj dum nia alveno. Apud la vilaĝo estis la cervupaŝtejo. 300-400 cervoj kun cervidoj paŝtiĝis tie. Mirinde mildaj estis la cervoj, oni povis tuŝi, karesi, kapti ilin. Sed niaj ĉevaloj timis la grandkornulojn kaj ankaŭ poste ili ne volis amikiĝi al ili.

Kelkaj el ni eniris tendon.

— Sidiĝu kaj manĝu!—diris la plej maljuna araĉono kaj montris al ni seĝojn starantajn en la tendo. Ili gastigis nin bonkore, donis al ni cervviandon kaj cervinlakton. Eŭropano malfacile komprenas, kiel oni povas vivi sen manĝo de pano. Ni jam vidis tion ĉe la japanoj, kiuj manĝas, anstataŭ panon, rizon kuiritan en akvo. Ankaŭ la araĉonoj havas panon ne el faruno, sed el cervkazeo. Post la manĝado, ni volis montri nian dankemon kaj donacis al ili cigaredojn. Eĉ la plej malgranda infano jam fumemis. Tion ni spertis, kiam post kelkaj horoj ili jam serĉis la cigaredojn en niaj poŝoj. Ni multe ludis kun la infanoj, ĉar jam de multaj jaroj ni ne estis en infana rondo.

La nokto zorgis pri nova aventuro. La cervaro venis foje tre proksimen al niaj ĉevaloj. La ektimintaj ĉevaloj deŝiris la ŝnurojn kaj diskuris. Dum la tuta nokto ni serĉis ilin kaj fantaziajn planojn ni faris por la retrovo. Ĉiu estis mobilizata. Parte surĉevale, parte

piede ni iris en ĉiuj direktoj. La serĉado estis terure malfacila, ĉar la kuloj eĉ spiri ne lasis nin. Ni timis, ke la ĉevaloj renaĝis la transan bordon.

Je la tagiĝo ni alarmis ankaŭ la araĉonojn kaj promesis al ili riĉajn donacojn, se ili trovos la ĉevalojn. Sen ĉevaloj ni estis perditaj, do kun komprenebla korpremo ni atendis la rezulton de la serĉado. La araĉonoj ekiris de tiu punkto, kie la ĉevaloj estis katenitaj kaj sekvis la postsignojn. Kaj post nelonge ili trovis la ĉevalojn. Riĉan donacon (2 funtojn da salo) ni donis al niaj savintoj. Du funtoj da salo estis vere princa donaco, ĉar salo tute mankis al ili. Ne nur la araĉonoj, sed ankaŭ la cervoj estis salmalsataj. Se iu nur etan saleron prenis sur la manplaton, tuj 50-60 cervoj amasiĝis por leki la salitan manon. Ili serĉis ĉie kaj ĉiam salon kaj komencis maĉi niajn dorsosakojn. Urinado estis danĝera pro la tumulta alkuro de la cervoj. Dum ni serĉis la perditajn ĉevalojn, la tempon uzis la cervoj por intensa serĉado. En iu tornistro trovis iu cervo ne salon, sed proksimume unu funton da sukero, kiun unu el ni kun granda sinreteno gardis kaj ne manĝis. La cervo estis konsternita, kiam ĝi, anstataŭ salon, trovis sukeron, sed kion fari? En sia granda ĉagreno ĝi manĝis ĝin. Oni ne povis reteni la ridon, vidante la strangan vizaĝon de la ŝparemulo, kiu en unu nokto perdis kion li monatlonge ŝparis kaj ne manĝis.

Niaj etnologoj kaj etnografoj havis nun bonan okazon studi popolon, kiu ekzistas kaj vivas—kiel oni diras en Eŭropo—„sen kulturo”. Por pli bone kompreni iliajn kutimojn kaj morojn, ili komencis la lernadon de la araĉona lingvo. Ankaŭ mi entuziasme lernis kaj sufiĉe bone parolis, sed bedaŭrinde hodiaŭ mi jam ne scias araĉone. Mi rememoras nur, ke *aron* signifas „cervo” kaj *araĉon* „la popolo de la cervoj”.

Pli trafan nomon vere oni ne povus doni al ili, ĉar ilia tuta vivo estas bazita sur la cervo. La cervo estas la feliĉo por ili. Ili rajdas la cervon, manĝas ĝian viandon, trinkas cervinlakton, la felon ili uzas kiel kostumon, el la intestoj ili faras fadenon. Krom la cervoj, tre gravaj estas por ili la betularboj. La tendoj estas konstruitaj el betuloj, el la krusto ili faras ĉiuspecajn ilojn. El krusto ili kunstebas ankaŭ boatojn, kies malpezeco sole ebligas antaŭeniri sur la rivero riĉa je akvofaloj.

Kompreneble ĉe popolo nomada havas nenian valoron la mono. Nur interŝanĝado ekzistas. Laŭ la rakonto de la maljunulo pasttempe ekzistis punktoj sur la riveroj, kien la komercistoj venis por ŝanĝi objektojn, sed post 1915 neniu venis. Al nia karavano estis malpermesita la ŝanĝado, tamen kelkaj ne povis kontraŭstari al la tento: akiri ŝanĝe felon de zibelo, de kastoro aŭ kornon de uro. La ŝanĝprezoj estis diversaj. Blanka vulpfelo kostis 50 cigaredojn. Ili proponis por funtduono da salo 20 sciurojn. Por 20 patronoj ili donis cervon. Ni aĉetis por la societo tri cervojn. Jam delonge ni volis gustumi cervviandon kaj ni decidis tuj buĉi cervon, por fari grandan festvesperon.

La maljuna araĉono montris la lertan, artifikan buĉmanieron. Preninte hakilon, ŝtelirante li alproksimiĝis kaj haltis malantaŭ la cervo. La cervo staris milde, per siaj senkulpaj okuloj ĝi rigardis nin kiel amikon kaj eĉ ne suspektis, ke ĝia vivo tuj finiĝos. La maljunulo per la malakra rando de la hakilo frapis tute malforte la kapon de la cervo. Verŝajne li trafis la oblongan cerbon, ĉar la cervo tuj falis kaj mortis. Kvazaŭ vulturoj kadavron, tiel atakis parto de la ĉeestantoj la mortintan cervon. Ili suĉis la sangon kaj ne kuiris, sed tuj krude manĝis la karnon. Mi neniam imagis, ke la homoj, se la sociaj katenoj iomete malligiĝas, tiagrade fariĝas bestoj. Sur la dispecigita cervo montris al ni la araĉono, kial la cervoj ne povas longe kuri dum la somero. La nazo de la mortinta cervo estis plena de parazitoj, kiuj malhelpas la spiradon. Dum vintro la parazitoj ne povas rezisti la malvarmon kaj pereas. Tial povas kuregi la cervo vintre. Ĝi faras tage po 100-200 verstojn. Ni vane petis, ke ili pruntedonu al ni cervojn ĝis la rivero Vitim, ili ne konsentis, ĉar laŭ ili la cervoj ne taŭgas somere por longdaŭra vojaĝo. Nur la maljuna araĉono montriĝis ema veni kun ni kiel gvidanto, kiam ni promesis, ke ni donacos al li nian tendon.

La sekvintan tagon, frumatene li vere estis preta gvidi nin. Li kunprenis nur tri pantoflojn faritajn el cervfelo.

— Ete sufiĉos sur la vojo—li diris araĉone. Li ekiris kaj la karavano sekvis lin.

## X-a ĈAPITRO

(en kiu oni povas legi ion pri la tiel nomata „praarbaro”)

### En la praarbaro

Ni devis, sub la araĉona gvidado, fari po 20 verstojn tage. Tio kostis 12 horojn de marŝo. Sed fakte nur malofte ni sukcesis fari tian vojon. Jam la ekiro komenciĝis kun prokrasto. Ĉiam okazis io, kio malhelpis nin kaj devigis ŝanĝi la tagan programon. Kiam matene estis aŭdebla la batalkrio „Leviĝu!”, la plimulto volis „nur per kelkaj minutoj” plilongigi la dormtempon kaj restis surtere ŝajnigante dormon.

La nokta gardanto preparis ĉiam la matenmanĝon. Hindaj fakiroj ne povas manĝi pli simple ol ni. La matenmanĝo konsistis el kuirita akvo kaj el kelkaj pecoj da biskvito. La kuiritan akvon ni nomis teo, ĉar kelkfoje okazis, ke ni metis en la akvon ankaŭ teherbon. Tion ni jam tute forgesis, ke la teon oni trinkas kelkloke kun sukero kaj rumo.

Granda ĝojo estis ĉiutage la ricevo de sekpano kies pezo ne estis pli ol 10-15 dekagramoj. Kun ia sopiro ni atendis ĉiumatene la momenton, kiam la disdonado de la porcioj komenciĝis! Ni ne kuraĝis tuj manĝi. Ni rigardis kaj pesis per la okuloj la diversajn pecojn. Ĉiajn artifikojn ni provis, por ke la pano daŭru pli longe.

Kelkaj nur suĉis la panon. Aliaj, maĉinte la panon, retenis ĝin en la buŝo kaj nur post minutoj ili glutis ĝin por plilongigi la ĝuadon de panmanĝo. La pandisdonado okazis ĉiam sub la plj granda kontrolo, en ĉeesto de fidinduloj. Tamen ankaŭ la fidindulojn ĉiam kontrolis pli la fidindaj okuloj de ĉiuj.

Post la matenmanĝo komenciĝis serioza laboro, ĉar la ekipo de l' ĉevaloj donis ĉiumatene grandan zorgon. La ŝarĝportilojn konstruis ni mem, tamen—aŭ ĝuste pro tio—ili ne estis perfektaj kaj ofte oni devis ilin plibonigi. Jen ŝiriĝis ŝnuro, jen vundiĝis la dorso de ĉevalo. Tiam la ŝarĝon de la malsana ĉevalo oni devis dividi inter la sanaj.

Inter la ĉevaloj kaj iliaj akompanantoj estiĝis vera amikeco. Tial dum tia nova ŝarĝdividado neniu volis akcepti la ŝarĝpli-grandigon de sia ĉevalo. Krioj, protestoj, blasfemoj estis aŭdeblaj,

se oni komencis fari novan aranĝon.

— Ili volas pereigi mian ĉevalon, ĝi apenaŭ povas porti sian ŝarĝon kaj ili denove pakas sur ĝin sakon da biskvitoj!—murmuris kolere Kiss, unu el la ĉefĉevaldirektoroj.

— Mia ĉevalo estas nur ostoj kaj haŭto, ĉu vi havas koron, ke vi deziras, ke ĝi portu pli multe?—montris la ŝtelĉasisto al sia ĉevalo, kiun flegis la idealisma advokato. Ambaŭ—la ĉevalo kaj la advokato—portis sian ŝarĝon kun senvorta rezigno.

Iom post iom la homoj dividiĝis en du apartajn sekciojn. Ekzistis unuaklasaj kaj duaklasaj homoj. Al la unua klaso apartenis tiuj, kiuj sciis la ĉevalflegadon, al la dua tiuj, kiuj—kiel mi—en sia junaĝo ne pasigis sufiĉan tempon en stalo kaj ne fariĝis ĉevalspecialistoj.

—Kompreneble, tion oni ne instruas en la universitato!—diris ironie la grandbuŝulo vidante nian mallertecon. Cetere, li tre kole-ris al la inteligentuloj.

Post pli-malpli granda interbatalo de diversopiniantoj komenciĝis la marŝado. Senripoze kaj seninterrompe 4 horojn ni marŝis, se nenio intervenis. Iri monton estis lacige, la valoj estis marĉplenaj kaj malfacile estus diri kie estis pli malagraba la marŝado: ĉu sur monto aŭ en valo. En valo ni devis salti de unu herbtufo ĝis la alia, se ni volis eviti ke ŝuoj pleniĝu tuj per akvo.

—Domage, ke mi ne naskiĝis ĉamido—sopiris iu kamparano, kiam li, post maltrafa salto, falis en kavon kaj povis nur malfacile elrampi.

Sed neniu povis eviti sian sorton. Vane ni intencis resti sekaj. Post unu-du-hora marŝado ĉiam ankoraŭ venis laĝeto post laĝeto, rivereto post rivereto. Se en kelkaj lokoj ni ne sukcesis improvizi transirilon per faligitaj praarboj, ne demetinte la ŝuojn kaj la pantalonon ni eniris la akvon kaj malsekiĝinte ĝis la kolo ni daŭrigis la vojon.

La montoj estis 1 000-2 000 metrojn altaj. La ĉirkaŭaĵo videbla de la montosuproj estis kelkfoje vere majesta kaj eĉ en kinematografajo oni ne povis vidi pli belajn. Sed ni ne havis humoron por ĝui la belaĵojn de l' naturo. Kun malplena stomako oni ne estas estetikisto. Lace ni trenis nian korpon, ĉiam rigardante, ĉu ni ne atingis jam la akvo-disiĝejon, ĉar se la akvo komencas flui en



kontraŭan direkton, tio montras, ke ni jam trapaŝis la plej supran punkton de la montaro.

Dum la marŝado ni trinkis la freŝan akvon de la rivero, 4-5 litrojn antaŭtagmeze, kaj ŝvitante ni kuŝiĝis sur la herblito dum la tagmeza ripozo. Niaj kuiristoj estis Sepi kaj Dolfi, kiuj siatempe ricevis tiun altan oficon kiel privilegion. Sed tiu ofico nun signifas por ili nur malavantaĝon, ĉar krom marŝi ili devis ankaŭ kuiri. Tial ili proponis labordividon tiamaniere, ke ili havu nur la direktadon, la simplan laboron havu aliaj.

La tagmanĝo estis tre simpla; ĝi konsistis el kaĉo aŭ el rizo. La diversecon de la menuo ni tiel akiris, ke se por tagmanĝo estis kaĉo, por vespermanĝo ni kuiris rizon, kaj inverse: se por tagmanĝo estis rizo, restis la kaĉo por vespermanĝo. Ni kuiris kun akvo, ĉar grason kaj oleon ni ne havis. Sed nia apetito estis vere bona, ni lekis la telerojn puraj.

La vesperan ripozejon ni elektis kun granda zorgemo. Avenon ni jam delonge ne havis kaj sen abunda paŝtejo niaj malfortaj ĉevaloj ne estus povintaj porti la ŝarĝon.

La manko de herbo, akvo kaj seka ligno devigis nin kelkfoje marŝi plue, malgraŭ ke ni jam sopiris ripozon; aliffoje abunda paŝtejo haltigis nin jam fruan posttagmezon.

Novajn impresojn—krom la naturo—donis al ni nia gvidanto, la maljuna araĉono. Li estis vere inteligentulo. Kiel lerte li gvidis nin inter la densaj arboj, riveroj, montoj! Vespere, kiam ni metis grandajn ŝtiparojn por defendi nin kontraŭ la malvarmo (dum la nokto estis jam malvarme) kaj kontraŭ la kuloj, kelkfoje ni interparolis en interesa miksaĵlingvo.

— Post kelkaj semajnoj estos jam vintro—rimarkis iu, kiu frostetis.

— Vere, sed ni araĉonoj amas la vintron. La somero estas malĝoja kaj malbela. Nenio kreskas krom herbo. La kuloj ne lasas trankvilon. La dumtaga varmego malvigligas la homon. Ni amas la vintron—la puran, freŝan aeron, la ĉassezonon—diris la maljunulo fiere.

— Sed kiel vi povas vivi vintre en tendoj?—demandis ni.

— Ĉu vi vidas niajn karajn bestojn, la nordcervojn? La felo de la cervo defendas nin kontraŭ la vintro. La cervoflegado postulas

multan prizorgon, sed donas grandan utilon.

— Ĉu vi estas kontenta je via vivo?—kelkfoje ni demandis.

— Kial ne? La araĉona gento estas la plej nobla en la tuta mondo. Oni ne povas ĝin kompari al aliaj gentoj, ekzemple al la jakuta aŭ burjata. Ĉe ni ne ekzistas malhonestaj homoj. Niaj magazenoj plenaj de sekviando, nia ilaro, niaj feloj estas libere, sen ŝlosiloj en la praarbaro, sur la arboj, en du-tri-metra alto. Neniu ŝtelas, kaj neniu estas punata.

— Sed se tamen iu farus ion kontraŭ la kutimoj?

— Ni ligas liajn manojn kaj li ne ricevas manĝaĵojn dum kelkaj tagoj aŭ semajnoj. Sed tio malofte okazas.

10 tagojn ni estis jam kune, kiam la maljunulo diris, ke li devas nin adiaŭi ĉar plu li jam ne konas la vojon. Laŭ diroj li scias ke post 3-4-taga marŝado ni venos al la rivero, kiun ni intencas atingi. Li deziris ĉion bonan kaj forlasis nin, nia lasta amiko. Nia lasta homa ligilo kun la mondo ŝiriĝis.

„Antaŭen per kompasoj!” estis la devizo. Ni multfoje rigardis ĝin ankaŭ ĝis nun, sed de tiu minuto ĝi fariĝis nia plej bona amiko. Ni iris rekte okcidenten. La naturaj malhelpoj multfoje haltigis nin. Niaj ĉevaloj estis senfortaj kaj kelkfoje 5-6 homoj devis helpi ĉevalon por ebligi al ĝi la antaŭeniron.

Krom la malhelpoj de la naturo malhelpis nin ankaŭ la moralaj difektoj, kiuj montriĝis ĉiam pli kaj pli. Ekplodis konfliktoj, kelkfoje preskaŭ fluis sango. Malpacienco faris la homojn nervozaj, malpacemaj. Sed en ĉi tiu peza atmosfero tamen ĉiu streĉis la fortojn kun malespera volo. Kun ŝvitanta korpo, ŝvelintaj vejnoj, kunpremitaj lipoj, grincantaj dentoj ni iris antaŭen. La puŝon de la streĉita volo ni kvazaŭ sentis en nia dorso.

Kaj ĉi tiu volo venkis ĉion.

Post kvar tagoj brilis antaŭ niaj okuloj la plej kara rivero, la sopirita Vitim.

## XI-a ĈAPITRO

(pri la daŭro de la aventuro sur la rivero kaj pri la alveno en la landon de la oro)

### Sur Vitim

Laŭ la originala programo post la atingo de la rivero ĉiuj malagrablaĵoj devis finiĝi. Ĉu ekzistas io pli simpla ol konstrui flosojn kaj portigi nin per ili ĝis loĝata regiono? Sed en la realo, kiel tiom da fojoj, ankaŭ nun montriĝis, ke fari planojn kaj efektiviĝi ilin estas tute malsamaj<sup>1</sup> aferoj.

Per scivolaj okuloj ni rigardis la ŝajne trankvilan riveron. Kia forto en la eterne fluantaj ondoj! Ĉu ne mirinde, ke konstante venas, venas novaj akvamasoj kaj iras for? Kian sorton ili portos por ni?

Montriĝis, ke ankaŭ la floskonstruado ne estas infanludo. Trovi taŭgajn lignopecojn estis tre malfacile. Sed pli granda malfeliĉo estis niaj malkonsento kaj malamikeco. Ni ne havis gvidanton, kies vorto estus estinta ordono. La diverseco de socia stato nur pliprofundigis la malkonkordon. La antipatio inter inteligentuloj kaj malinteligentuloj fariĝis ĉiam pli granda. Ju pli ni proksimiĝis al nia celo, des pli oni povis aŭdi voĉojn, ke en Sovetlando la inteligentuloj havas nenian rajton kaj ĉion gvidas nur la fizikaj laboristoj.

Ankaŭ la konstante plimalboniĝanta nutraĵo malbone influis la animojn.

Grandan bruon kaj disputon kaŭzis la elekto de la flosformo. Ĝis nun ĉiu estis specialisto pri floskonstruado. Sed alveninte al la rivero, nur unu kozako havis detalan planon. Laŭ lia kalkulo ni devis konstrui sep flosojn: kvar grandajn kaj tri malgrandajn. Ni intencis kunporti ok ĉevalojn. La ceterajn ni volis manĝi. La nutraĵo estis malbona. La espero variigi la menuojn per ĉasado kaj fiŝkaptado ne efektiviĝis. Niaj famaj ĉasistoj, reveninte senrezulte, ĉiam havis pretekston pri la malsukceso.

– Mi ne havis feliĉon hodiaŭ!

---

<sup>1</sup>aliaj en la originalo

— Mi vidis postsignojn de uro, sed ni ne kuraĝis iri pli malproksimen, ĉar ni timis, ke ni ne povos reveni.

— Fiŝoj ne estas kapteblaj en malklara akvo!

Se la akvo estis pura:

— En tiel pura akvo la fiŝoj ne montriĝas.

Ne restis alia, ol manĝi la ĉevalojn. Sed kies ĉevalon? Komenciĝis la disputado. Kelkaj jam rigardis la ĉevalon kiel sian proprajon kaj ili ne volis oferi ĝin por la komuna celo. Fine la plej malbonaj estis kondamnitaj je buĉado. Vespere ni jam manĝis ĉevalviandon kun rizo. Estas fakto, ke la vespermanĝo tre bone gustis al ni; ĉu ni estis tre malsataj, aŭ la ĉevalviando estis bona?

Postan tagon, matene ni serĉis konvenan lokon kaj taŭgajn arbojn por floskonstruado. En la proksimo estis nek arbo, nek loko. Nur je duversta malproksimo estis sufiĉe da sekaj arboj. Nun montriĝis, kiel supraĵaj estis niaj konoj kaj kiom malbona estas ĝenerale la observkapablo de la homoj.

Pri aĵoj, kiujn ni multfoje vidis tage—se oni demandus ilian detalan priskribon—montriĝus, ke ni ne konas ĝin. Por kunigo de la flostrabaj neniuj sciis, kiamaniere ligi la trabojn. Kiam la kozako proponis fari tion per salikplektaĵoj, multaj kontraŭdiris:

— Ĉu vi opinias, ke mi riskos mian vivon per viaj malfortaj plektaĵoj?—kriis la grandbuŝulo.

— Mi neniam vidis en mia vivo tiel ligi. Ni devus ligi per kruc-traboj aŭ per lignaj najloj—aldonis la estinta lakeo. La kozako asertis, ke nur per lia metodo oni povas atingi bonan kaj certan rezultaton, sed vane. Du grupoj de po tri homoj apartiĝis kaj tiel ili komencis labori. Nur kiam ili vidis, ke ilia laboro ne progresas, ili komencis kune labori.

Jam estis pretaj la flosskeletoj kaj nur la remiloj mankis, kiam sole al la hazardo ni povis danki, ke ne perdiĝis ĉio.

Ni eltiris la flosojn ĝis la bordo kaj fiksis ilin per ŝtonoj. Dumnokte la akvo de la rivero plimultiĝis kaj ŝvelinta rivero kunportis la duonpretajn flosojn. En tiu ĉi vojaĝpriskribo multfoje estis citata la idealisma advokato. Li estis homo, kiu vivis tre interesan animan vivon, sed estis tre mallerta en ordinaraj aferoj, pro kio li estis senĉesa celtabulo de moko.

Mateno krepuskis, kiam li, profundiĝinte en siaj pensoj, tute

hazarde rimarkis en la matena nebulo la naĝantajn flosojn.

— La akvo portas niajn flosojn—kriis li fortege kaj en la sekvinta momento li jam kuregis en la glacie malvarman akvon por reteni la flosojn, ne atentante, ke la akraj ŝtonetoj vundas liajn piedojn. La alarmsignalo vekis ankaŭ nin kaj post momentoj—duondorme—ni jam estis en la akvo. Sep flosojn ni sukcesis reteni, la oka naĝis pli kaj nur la idealisto kuraĝis peni kaj lukti por ĝi. Terura batalo komenciĝis inter homo kaj akvo. Victor Hugo<sup>1</sup> skribis en sia romano pri la matrozo, kiu sur ŝipo, dum uragano, ligis la liberiĝintan kanonon.

Tie kaj tie ĉi venkis la homa forto.

Honorordenon ni ne povis al li doni, nur senvorte ni admiris lian heroaĵon.

Febre ni komencis pretigi la remilojn. La nutraĵoj tagon post tago plimalmultiĝis. Ĉevalviandon ni multe manĝis, ĉefe rostitan, sed sen salo ĝi gustis tre malbone. Tamen ni buĉis denove ĉevalojn, ĉar sur niaj flosoj nur ok ĉevaloj havis lokon.

Kio povas kaŭzi tiun bruon? Ĉu monta rivero? Ĉu akvofalo? Je tiu penso frostotremeto trakuris nian korpon. La flosoj plirapidigis, la montoj fariĝis pli grandaj kaj la rivero pli malvasta. Ĉe kurbiĝo la kunpremitaj akvoamasoj faris la teruran bruon kaj duonmetrajn ondojn. La ĉevaloj sur la flosoj tremante staris sur siaj lokoj, ni kun superhoma fortostreĉo laboris per la remiloj por eviti la rifrokojn. Malgraŭ la fortostreĉo du kunligitaj flosoj ĵetiĝis al ŝtonego kaj la plektaĵo disŝiriĝis. La flosa rompiĝis en du partojn. Komprenoble, la homoj kaj ĉevaloj teruriĝis. Dum la homoj konvulsie kruciĝis al la traboj, la ĉevaloj saltis en la akvon kaj naĝis sur la bordon. Minutlonge daŭris tiu danĝera situacio. Per la helpo de la ceteraj flosoj fine ni sukcesis albordigi ĉiujn flosojn. Nur kelkaj objektoj perdiĝis. Tiu epizodo esence ŝanĝis la ĝeneralan opinion. Ĝis nun ĉiu postulis kunporti la ĉevalojn, sed nun la plimulto diris, ke nur la ĉevaloj kaŭzis la tutan malfeliĉon kaj ni lasu la ĉevalojn en la praarbaro. Ni decidis lasi kvin ĉevalojn liberaj sur la bordo kaj nur tri kunporti. Kvar personoj el ni ne kon-

---

<sup>1</sup>franca verkisto (1802-1885)

sentis pri la decido kaj ili restis kun la ĉevaloj en la praarbaro. Ili repostulis la nutraĵprovizon kaj perĉevale intencis fari la vojon. Vane ni provis aliigi ilian decidon, ili restis, kaj ni daŭrigis la vojon sen ili kaj sen la kvin ĉevaloj.

Multajn danĝerojn ni travivis dum la sekvintaj tagoj, jen remilo rompiĝis, jen la floso venis sur sablaĵon kaj eĉ per ĉevaloj ni ne sukcesis puŝi ĝin sur la akvon. Nia konstanta timo estis akvofalo. Ĉe ĉiu malproksima kaj ĉiam proksimiĝanta bruego, malvarma ŝvito kovris nin. Estis terura ĉi tiu freneza galopo sur la torento rapida, nekonata riverego, muĝanta inter altaj rokoj, faranta subitajn kurbojn, minacante post ĉiu kurbo per io neatendebla. Kiam ni falos en ŝaŭmantan profundon, frakasiĝante sur la akraj rokoj? Por karakterizi nian staton, mi nur mencias, ke malgraŭ ke ni vivis kaj vojaĝis sur rivero jam de semajno, ni ne lavis nin. Poste la rivero plilarĝiĝis, la flosoj kviete naĝis, la suno brilis sur la ondoj. Kaj sur la bordo ni ekvidis signojn de homa kulturo.


Fine, homoj! La unuaj, kiujn ni trovis, laboris en orminejo. Ili emociigite rigardis la flosojn, kiuj alportis homojn nekonatajn. Ilia havaĵo konsistis el laktproduktaĵoj kaj oro. Por interŝanĝo tie ĉi estis vere bona okazo. Eĉ por alumetskatolo ili donis kelkajn gramojn da oro. Ni ripozis kelkajn tagojn kaj poste, jam en homloĝataj regionoj, ni daŭrigis nian vojon.

La robinzonado finiĝis. Bedaŭrinde, mi ne havis en la praarbaro tian bonan kunulon, kiel Robinzono sian Vendredon. Miaj helpantoj estis nerompebla volo hejmeniri kaj tiu bona, kara facilanimeco, kiun la vaga vivo donas al la sana homo. Ĝemi kaj blasfemi, se malheliĝas la sorto, sed ridi plenbuŝe, se ĝi sereniĝas. Kaj ne zorgi pri tio, kio estos morgaŭ.

Kaj nun, hejme, trapensinte ĉion, la multan suferon kaj malmultan ĝojon, mi vidas, ke ĉio fariĝis memoro, la sufero same kiel la ĝojo. Kaj—strange, sed feliĉe—ĉia memoro ĉiam estas bela.

**Aliaj Esperantaj originalaĵoj aperintaj  
ĉe nia eldonejo**

- *Sur la linio*. Rakontoj kaj noveloj de Georgo Kamaĉo (1991)
- *La seĝo dektria*. Facil-lingva novelo de George W. Wagner. Dua eldono (1992)
- *Kompreni*. Noveloj de Gonçalo Neves (1993)
- *10 jarojn poste*. SF-bildstriaro de J.P. Humphreys (1995)
- *Rakontoj prapatraj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam okazemis aferoj mirindaj*. Falsloraj rakontoj de Doko (1996)
- *Kanto de telegrafistoj*. Poemaro de Josip Velebit (1996)
- *Amara vivovojo*. Membiografio de M. Mandrik (1997)
- *Usono nigre-blanke*. Inform-libro pri Usono de Ionel Oneț (1998)
- *Spite la vivon!*. Poemaro de Mișu Beraru. Dua eldono (1998)
- *Marionetoj*. Poemaro de Carmel Mallia (1999)







La memuaro de Teodoro Schwartz pri Siberio, mallonga kaj verkita simplastile, estas esence aventura rakonto—rakonto pri junula inventemo kaj eltenemo, en stilo tia, kia la aŭtoro mem ŝatis legi en aliaj tiaj rakontoj. La jaro estas 1920. La rakonto nin portas, ene de kelkaj paĝoj, el milita kaptiteco en la Rusa Malproksima Oriento laŭ vojaĝo tra militŝirita kaj necer- ta Rusio, dum kiu la aŭtoro serĉas vojon reiri al Eŭropo per ĉiu ajn rimedo. La vojaĝo komenciĝas per eskapo el kaptokazerno, kaj trajnveturo, kiu daŭras pli ol du semajnojn, portanta lin el Ĥabarovsk, norde de Vladivostoko, ĝis la plej sovaĝa regiono tra kiu pasas la Transiberia Fervojo, nome la montaroj norde de la Rivero Amur. De tie, nia aŭtoro piediras tra la montoj, fine atingante unu el la riveroj, kiuj fluas al Ar- kta Oceano. Li kaj la kunvojaĝantoj fine atingas la civilizon per flosiloj laŭ la danĝeroplana Rivero Vitim.

Humphrey Tonkin

ISBN 1-882251-24-5